# ESPERANTO

MARTO 1963

56a Jaro - N-ro 688 (3)

# esperanto

REVUO INTERNACIA

MARTO 1963

56a JARO

N-RO 688 - (3)



*Fondinto :* H. HODLER

**Ĉion por redakto** oni sendu al:
D-ro V. Sadler, adreso ĉe la Centra Oficejo.

**Ĉion pri administrado de UEA** kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando, Telefono: (010) 3 27 88. Ĝirkonto 378964.
TELEGRAMADRESO : ESPERANTO ROTTERDAM.

**Ĉiu materialo por difinita numero** devas atingi la Centran Oficejon (vidu supre) **antaŭ** la 1-a de la antaŭa monato.

**Bankisto de U.E.A. :**
R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-1.

**Traduko kaj represo** de artikoloj estas permesitaj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represaĵon al nia redakcio.

**Jara abono (1963):** 11,50 gld. (kun membreco kaj jarlibro 15,— gld). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

**Tarifo por reklamoj:**
1 pago 128,— gld, 1/2 paĝo 64,— gld, 1/4 paĝo 32,— gld. 1/8 paĝo 16,— gld, 1/16 paĝo 8,— gld.

**Anoncetoj pri korespondado :**
0,15 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.
Tekstoj de anoncetoj kaj reklamoj aperas ekster la respondeco de la Redakcio.

**Legantoj en 84 landoj.**

**Estraro de U.E.A. :**

Prof. D-ro Hideo Yagi, prezidanto, 76 Kawaramachi, Okayama, Japanujo.
Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.
H. W. Holmes O.B.E., Vic-prezidanto, 38 Fillebrook Road, London E 11, Britujo.
E. L. M. Wensing, vic-prezidanto, Aalsterweg 217, Eindhoven, Nederlando.
D-ro André Albault, estrarano pri kulturaj aferoj kaj kongresoj, 8 Avenue Etienne Billières, Toulouse, Francujo.
S-ro Z. Czuba, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, Odýnca 73/100, Warszawa, Pollando.
S-ro E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.
S-ro Sv. Ziegler, helpa sekretario, H. P. Olsens Vaenge 37, Taastrup, Danlando.

**Centro de Esploro kaj Dokumentado**
77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono: ARNold 9081.

**Serva Centro:** ĉe J. J. Sturzenegger, Rothstr. 7, Zürich 6/57, Svislando.


**FRONTPAĜA BILDO:**

Dante en pergameno (p. 43)

## Enhavo


Survoje al sukceso *(Pompilio)* . . . . 41
Ĉiu helpu informadi ! *(Ziegler)* . . . . 41
Deirpunktoj *(Albault)* . . . . . 42
La kompleta Dia Komedio en Esperanto *(Lapenna)* . . . . . 43
Lumo *(Frišman/Suckever)* . . . . . 45
Lastaj novaĵoj el Afriko *(Grossmann)* 48
"Esperanto Scientific News" . . . . . 49
Bulgarujo (fotoj) . . . . . 50
Testamenti *(Woessink)* . . . . . 56
Statistiko pri la membraro 1962 . . . . 57

*Rubrikoj*

Novaj libroj . . . . . 46
Ricevitaj eldonaĵoj . . . . . 47
Forumo . . . . . 47
CED . . . . . 49
48-a Universala Kongreso . . . . . 52
Tra la Mondo . . . . . 53
Laŭfake . . . . . 53
La Juna Vivo . . . . . 54
Esperantista Vivo kaj Nekrologo . . 55
Radio . . . . . 55
Ŝaka rubriko . . . . . 55
Ni citas . . . . . 55
La Internaciaj Konkursoj 1963 . . . 56
Memoriga Kalendaro . . . . . 58
Oficiala Informilo . . . . . 58


**Manuskriptoj** por "Esperanto" estu liveritaj al la redakcio en du ekzempleroj. Ili devas esti klare tajpitaj en korekta Esperanto. Oni skribu sur nur unu flanko de la papero (prefere en normformato A4), kun interlinia spaco kaj kun tre larĝa marĝeno maldekstre por redakciaj instrukcioj al la presisto. Supersignitaj literoj devas havi la ĝustajn supersignojn, se necese permane aldonitajn. Neuzotajn manuskriptojn oni resendas nur kontraŭ afranko aŭ respondkupono.


**OFICIALA ORGANO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO**

(EN KONSULTAJ RILATOJ KUN U.N.E.S.C.O.)

# SURVOJE AL SUKCESO

"Matene oni vidas la belan tagon" diras malnova proverbo kaj ĝi bone povas esti uzata por la 48-a Universala Kongreso de Esperanto. Se ni konsideras ke oni laboras por Universala Kongreso de septembro/oktobro ĝis la fino de la Kongreso mem, ni povas diri, ke nun ni estas en la mateno de tiuj laboroj — kaj tiu ĉi mateno promesas vere belan tagon.

Antaŭ ĉio ni menciu la nombron de la ricevitaj aliĝoj (je presigo de tiuj ĉi linioj): 1706. Tiu ĉi estas la plej alta cifero atingita en tiu ĉi periodo en ĝisnunaj Universalaj Kongresoj. Ni komparu tiun ĉi ciferon kun la statistiko farita je la fino de februaro okaze de la 44-a U.K. en Varsovio, kiu estis la plej multnombra postmilita Universala Kongreso, kun ĉ. 3300 partoprenantoj. Je tiu dato estis ricevitaj 1404 aliĝoj, el kiuj pli ol 50% estis polaj, do el la kongresa lando. Nun el la 1706 aliĝoj nur ĉ. 31% estas bulgaraj. Per tio ĉi ni volas evidentigi la grandan interesiĝon, kiun vekis ĉe la eksterlandaj esperantistoj la 48-a Universala Kongreso de Esperanto.

Sendube gravan rolon ludas en tio la situo de la kongresa urbo: en suda lando, kun tre agrabla klimato, ankaŭ dum la varmaj someraj monatoj. Ne malpli grava estas, laŭ ni, la rolo, kiun ludas la bulgara esperantistaro. Estas konate, ke en Bulgarujo la Esperanto-Movado estas multnombra kaj aktiva, kaj pro tio la eksterlandaj esperantistoj fidas je ĝi kaj je ĝia laborkapablo, speciale nun en la organizado de la Universala Kongreso.

Ni povas diri, ke la sukceso de la 48-a Universala Kongreso baziĝas sur du kolonoj: la bulgaraj esperantistaro kaj aŭtoritatoj. Tiuj ĉi lastaj estas plene favoraj al la Esperanto-Movado kaj aparte al la venonta Universala Kongreso. Dum la nunaj kongresaj preparlaboroj oni povas renkonti ĉe ĉiu oficiala instanco la maksimuman helpemon. Ĉiu ĝuste taksas la gravecon de Universala Kongreso de Esperanto kaj bone komprenas, ke sukcesa kongreso estas iasence reklamo en eksterlando por la gastiganta lando.

Sed la Loka Kongresa Komitato ne ekzistas nur por atendi la alvenantajn aliĝojn. Ĝi estas streĉe laboranta por ke ĉiuj detaloj de la Kongreso estu en plena ordo.

Specialan atenton ĝi donas al la organizado de la Internacia Arta Festivalo, la unua post Harrogate, kiu estos unu el la ĉefaj karakterizoj de la 48-a Universala Kongreso.

Laŭ la ĝis nun ricevitaj proponoj, ankaŭ la Festivalo promesas fariĝi sukcesplena. Ankoraŭ definitivan programon ne eblas nun publikigi: pluraj detaloj estas ankoraŭ konkretigendaj. Sur p. 42 ni tamen jam mencias kelkajn el la proponoj, kiujn la Loka Kongresa Komitato ricevis kaj kiuj tre verŝajne aperos en la definitiva programo de la Festivalo. El ili la leganto povos jam imagi, kia ĝi estos: ampleksa, interesa kaj sur la plej alta nivelo.

Multnombra aliĝado, interesa programo: tio indikas ke la 48-a Universala Kongreso de Esperanto en Sofio troviĝas sur la ĝusta vojo al sukceso.

**G. G. Pompilio**

## ĈIU HELPU INFORMADI !

La sukceso de la Dua Laborplano de UEA esence dependas de la paralela plenumo de la interligitaj bazaj branĉoj: informado, instruado, kultura kaj praktika agado. La amplekson de la informa branĉo, kiu postulas same tian konscie planitan agadon, oni vidas rekte ne en la paragrafo 6 de la Laborplano, sed en la Fundamenta Principaro pri Informado pri la Internacia Lingvo, akceptita en Frostavallen, 1959 (vd. Jarlibron 1959. 186).

La informado celas diskonigi Esperanton, ĝiajn sukcesojn, la valorojn kreatajn en ĝi aŭ pere de ĝi kaj la praktikajn servojn de la Movado, samtempe rebatante al misprezentoj kaj penante detrui la antaŭjuĝojn de la publiko, speciale de la kultura kaj politika vivo. Fina celo estas la pozitiva favorigo kaj inklinigo eklerni la lingvon.

Nepra laborkondiĉo estas absoluta objektiveco, klara koncepto pri Esperanto kiel vivanta kultura lingvo kaj forigo de ĉio sekteca el la Movado, scio pri — sed ne nepre mencio de — diversaj projektoj nun advokatataj, ktp. La agado devas esti konstanta, malsporada, intensiĝante en kampanjoj, kiam la alibranĉa laboro oportunigas tion.

Laŭ tiuj linioj plej diversaj metodoj estu paralele aplikataj: gazetara servo, leteroj al redakcioj, anoncoj, radio kaj televido, filmoj, ekspozicioj, prelegvojaĝoj, flugfolioj, broŝuroj, afiŝoj, gazetaraj konferencoj ktp., kaj plej diversaj medioj estu "atakataj", precipe junuloj, studentoj, lernejoj.

La necesan kunordigon sur la internacia nivelo prizorgas la Informa Fako de UEA, klopodante harmoniigi la laboron en la diversaj landoj, donante al tiuj konsilojn, materialojn kaj alispecan helpon kaj analizante la tutmondan laboron. Multaj landaj asocioj jam delonge fondis sian informan fakon, kiu plenumas la samajn taskojn sur la landa nivelo. Nun jam estas tempo, ke la ceteraj landoj kaj la lokaj grupoj komisiu po unu aŭ pluraj personoj prizorgi la informadon laŭ la specialaj kondiĉoj de la respektivaj medioj, por ke estu forte akcentita la batopovo de la Asocio, gravega en decidaj momentoj !

La laboro necesigas la helpon de ĉiu, ĉu funkciulo, ĉu simpla ano de la Movado. La kontribuebloj estas senfinaj. Ĉar la problemo de internacia lingvo estas urĝiĝanta, ni urĝe ekagu !

**Sven Ziegler**

# DEIRPUNKTOJ

**D-ro Andreo Albault**

Estrarano pri kulturaj aferoj kaj kongresoj.

**Internacia Arta Teatro ludos ankaŭ en Sofio !**

"La Leciono" de Ionesco, nuntempa avangarda franclingva dramisto, estos unu el la teatraĵoj, kiujn ludos la Internacia Arta Teatro (IAT) en Sofio. Ĝin kompletigos en la sama Oficiala Teatra Vespero "La Respektema P..." de J.-P. Sartre. Kvankam ne ĉio estas decidita, IAT tre verŝajne donos al ni la plezuron vidi alian faman teatraĵon de Sartre: "Malantaŭ la fermita pordo", kaj, el la moderna jugoslava teatro, du verkojn de Kljaković: "Hanibalo" kaj "Vilhelmo la Konkeranto".

La Bulgara Esperanto-Teatro ludos la "Komedion de eraroj" de Shakespeare en versa traduko de W. Auld kaj Asen Simeonov. Sin anoncis ankaŭ Pola Esperanto-Teatro el Lódź.

Apud tiu altkvalita teatro moderna kaj klasika ni povos ĝui sinprezenton de diversaj artistoj: operkantistoj bulgaraj, akordionistoj, violonĉelisto, harpsikordistoj... kaj ankaŭ de diversaj ensembloj: slovena ensemblo proponos sub la titolo "Oriento kaj Okcidento kantas" popolkantojn el la tuta mondo; kantĥoro kaj ĵazorkestro italaj, la pola kabaredo "Verda Simio", ĉarma ensemblo el studentoj de la Varsovia Konservatorio, kaj interlerneja ĥoro de 88 gejunuloj kompletigos la programon.

Kiam vi ĝuos en via brakseĝo de la urba teatro en Sofio la bonan ludon de la aktoroj, vi memoru, ke ili laboris dum longaj horoj — kiel ja faras ĉiuj artistoj —, kaj vi demandos al vi, ĉu tiu tuta laboro estis vere utila nur por vi mem aŭ ĉu tiuj artistoj ne havis pli vastan perspektivon, ol via distro unu fojon en la jaro ! Pripensu, ĉu ne ekzistus eblecoj, ke ankaŭ via landa kongreso permesu al niaj artistoj montri siajn talentojn: ili ja atendas tion ! Niaj Kongresoj laŭ la konsilo de Zamenhof mem devas esti homaraj festoj, sed nepre la kvalito de tiuj festoj, ilia alloga potenco al la ekstera mondo estos des pli forta, se jam niaj naciaj kunvenoj kaj kongresoj kaj — kial ne ? — ankaŭ niaj lokaj kunvenoj, iom post iom, laŭ la fluktuo de la cirkonstancoj sed kun fera persistemo, provos je sia skalo imiti niajn Artajn Festivalojn. Tiuj ja ne povas esti celo en si mem. Ili estas nur deirpunktoj.

# La kompleta Dia Komedio en Esperanto

*"En mezo de l'vojaĝ' de nia vivo*
*en arbareg' malluma mi troviĝis,*
*ĉar mi de l'rekta vojo forvojiĝis."*

"Per tiuj versoj komenciĝas la Internacilingva traduko de unu el la plej epokfaraj verkoj de la monda literaturo. Ĝi estas jam kompostita. Nun la presprovaĵoj estas korektataj jam la kvaran fojon kun la celo eviti preserarojn ĝis la ebla maksimumo. Tre verŝajne tiu ĉi impona verko, kiu prezentas historian kulturan eventon, estos publikigita en junio, aŭ eĉ pli frue. La eksterordinara graveco de la eldonaĵo ne nur pravigas, sed vere postulas kelkajn anticipajn informojn."

### Kiel ĝi ekestis ?

Antaŭ 20 jaroj mortis itala esperantisto. Li estis, se ne aktiva pioniro, do tutcerte tre malnova konvinkita esperantisto, jam de la periodo antaŭ la Unua Mondmilito. Li estis el Trento, tiam aŭstra urbo, sed sentis sin itala kaj partoprenis en la t.n. "irridentismo", t.e. movado sekrete celanta unuigon de Trento al Italujo. Kiam komenciĝis la milito, li estis forsendita al iu aŭstra urbeto por deviga restado tie, dum multaj jaroj. Kiam, post la Unua Mondmilito, Trento fariĝis parto de Italujo, li estis elektita urbestro de sia naskiĝurbo kaj ankaŭ en tiu funkcio daŭrigis la laboron por la Internacia Lingvo. Lia nomo estis Giovanni Peterlongo.

Dum la jaroj de ekzilo, G. Peterlongo, kiu estis tre kompetenta Dantisto kaj bona esperantisto, tradukis la tutan ĉefverkon de Dante en Esperanton, sed ne sukcesis eldoni ĝin antaŭ sia morto en 1941.

Inĝ. Paolo Peterlongo, la filo de Giovanni, nun tre konata industriisto en Milano, renovigis la klopodojn kaj antaŭ kelkaj jaroj turnis sin al Prof. D-rino Clelia Conterno-Guglielminetti, por ke ŝi prizorgu la eldonon. Kun la valora helpo de Prof. Waringhien kaj de D-ro Manders ŝi reviziis la tutan tekston kaj pretigis ĝin por publikigo. Aliflanke, Inĝ. Paolo Peterlongo pretigis luksan eldonon de la desegnaĵoj de Botticelli, kiujn la fama itala pentristo el la 15-a jarcento preparis por la tiutempa eldono de la Dia Komedio. Li ankaŭ rilatis kun la eldonisto koncerne ĉiujn teknikajn demandojn de tiu ĉi luksega publikaĵo. La verko, kune kun la ilustraĵoj de Sandro Botticelli, estos publikigita de la prestiĝa "Edizione SIEI Milano" kaj distribuata de "Le Monnier", Firenze. Ĝin, kompreneble, distribuos ankaŭ la Libroservo de U.E.A. La libro aperas sub la aŭspicioj de Itala Esperanto-Federacio, de Itala Instituto de Esperanto kaj de Universala Esperanto-Asocio kiel eksterordinara eldono en la Serio Oriento-Okcidento de U.E.A.

### Kelkaj vortoj pri la enhavo

La libro antaŭ ĉio enhavas la dankesprimojn de Inĝ. Paolo Peterlongo al forpasinta Prof. G. Canuto, al D-ro G. Azzi kaj Prof. C. Grazzini, al D-ro E. Dondi, Prof. C. Conterno-Guglielminetti, D-ro Manders, Prof. B. Migliorini, Prof. P. Baggellini kaj Prof. G. Waringhien pro iliaj resp. kuraĝigoj kaj helpoj. Sekvas artikoleto pri la personeco de Dante de Giovanni Boccaccio. Prof. Bruno Migliorini, unu el la plej elstaraj lingvistoj de la hodiaŭa mondo, kiu mem parolas la Internacian Lingvon, verkis brilan artikolon sub la titolo "Dante Homo kaj Poeto". La biografio de Dante Alighieri estas verkita de Paolo Peterlongo. Prof. Piero Bargellini, unu el la plej grandaj italaj artkritikistoj, verkis la studon pri Sandro Botticelli kaj liaj desegnaĵoj por la Dia Komedio. Sekvas la antaŭparolo de Prof. G. Waringhien, en kiu li kompetente analizas la tradukon el lingva kaj poezia vidpunktoj. Plia artikolo de Paolo Peterlongo donas biografiajn informojn pri la tradukinto kaj prezentas lian noblan personecon. Ĉiuj menciitaj tekstoj, kun du tutpaĝaj reproduktaĵoj, ampleksas 50 grandformatajn paĝojn de 27,5 × 20,5 cm. Post tiu enkonduka parto, kiu per si mem estas valorega kolekto da studoj, sekvas la teksto mem de la Dia Komedio

kun abundaj komentoj en piednotoj, kio konsiderinde faciligos la legadon. Ĉiuj tekstoj estas en du lingvoj: la itala kaj Esperanto. En la enkonduka parto ĉiun artikolon kaj studon en la itala postsekvas la Esperanta teksto de la sama artikolo aŭ studo. Male, la Dia Komedio mem estas presita en du kolumnoj, el kiuj la unua estas la itala originalo kaj la dua la traduko. Por ĉiuj konantoj de la du lingvoj tio donas specialan avantaĝon, ĉar ili povas kompari la tradukon kun la originalo. Fine, al la verko estas aldonitaj en aparta dosiero la reproduktaĵoj de la desegnaĵoj de Sandro Botticelli.

**Iom pri la drameca historio de la desegnaĵoj**

La desegnaĵoj de Sandro Botticelli meritas apartan mencion. La subaj koncizaj informoj estas ĉerpitaj el la studo de Prof. Bargellini. En ĝi li skribas:

*"Dante instruis al li elteni la kalumniojn kaj serĉi la puran veron, elvekis en li la amon al la justeco kaj la kuraĝon de sia kredo. Ne vane li kun Dante malsupreniris en la Inferajn profundaĵojn, suriris la Purgatoriajn ŝtupegojn kaj traflugis la Empireajn spacojn".*

Botticelli komencis la ilustradon de la Dia Komedio ĉ. la jaro 1480, sed devis interrompi la laboron kaj povis denove reveni al ĝi nur post du jaroj. La tutpaĝaj bildoj devis esti entute 100, sed nur 3 povas esti rigardataj kiel kompletaj, t.e. desegnitaj per arĝenta pinto, restrekitaj per plumo, ombrumitaj per sepio kaj akvarele kolorigitaj. Tiu kolekto — la "Dante en Pergameno" — kiun oni taksis "mirindaĵo", malaperis kaj dum 4 jarcentoj oni kredis perditaj la bildojn de Botticelli. Nur en 1854, en la Biblioteko de la Duko de Hamilton ĉe Glasgow, oni trovis 85 el ili, binditajn en unu volumo. En 1882 la Muzeo de Berlino akiris tiun volumon. Post malmulte da tempo oni malkovris en la Vatikana Biblioteko alian volumon, tre maldikan, kiu enhavis 8 aliajn bildojn de Botticelli. Do, sume oni havis 93 bildojn, kiujn oni rajtis opinii la tuta verko de la artisto.

Post la fino de la lasta mondmilito ŝajnis, ke, pro la detruo de unu bunkero, multaj bildoj perdiĝis. Ŝajnis, ke estis savitaj nur 27, kio, kune kun la 8 de la Vatikana Biblioteko, donus la negrandan nombron de 35. Feliĉe, tamen, ne estis tiel, ĉar montriĝis poste, ke la mankantaj bildoj estis kaŝitaj en alia bunkero en la Zoologia Ĝardeno de Berlino. La Rusoj portis ilin al Moskvo, sed redonis en 1959 al la Muzeo de Okcidenta Berlino.

Ĝis nun Lippmann farigis 500 ekzemplerojn de reproduktaĵoj en Londono en 1891 kaj 1896. Supino faris 300 ekzemplerojn en 1921 en Bolonjo. Reproduktaĵoj troviĝas ankaŭ en la eseo de A. Venturi pri Botticelli (1921), sed ili estas palaj kaj preskaŭ nevideblaj. Kelkaj bildoj ornamas la verkon de Dante, kiun publikigis *Edizioni Palatine* en Torino (1946) kaj la eseon de f-ino Batard en Parizo (1952), sed neniu ĝis nun provis entrepreni reprodukton de ĉiuj nun konataj bildoj de Botticelli en unu sola volumo. Precize tion realigis Paolo Peterlongo "studamanto kaj kolektanto, mecenato kaj klerulo, honore al la memoro de sia patro, Giovanni, Trenta patrioto kaj pristudinto de Dante". Peterlongo sukcesis "per ĉiuj modernaj eltrovaĵoj, optikaj kaj kalkografiaj, refreŝigi la reproduktaĵojn, kaj igi la desegnaĵojn, ne nur legeblaj, sed senteblaj, t.e. vibrantaj je la origina linia stilo de Botticelli".

☆

La nuna eldono de la Dia Komedio estas pli ol grava: ĝi estas unika pro la pozicio de Dante en la monda kulturo, pro la paralelaj tekstoj en du lingvoj, pro la aŭtoritataj nomoj de la kontribuintoj kaj pro la kompleta kolekto de la desegnaĵoj de Botticelli. Ĝi vaste transpasas la jam vastajn limojn de la literaturo kreita kaj kreata en la Internacia Lingvo. Ĝi estas verko, kiun havigos al si ne nur ĉiu klera esperantisto senkonsidere al la prezo — kiu, tamen, estos tre malalta kompare kun la valoro de la eldonaĵo —, ne nur kleraj konantoj de la itala lingvo, sed ankaŭ bibliofiloj ne sciantaj la du lingvojn. Paolo Peterlongo ne povis pli bele kaj pli digne esprimi omaĝon al la memoro de sia patro ol per publikigo de lia traduko en tiel impona, vere monumenta formo.

Fine, ankoraŭ io. Kiam mi legis la lucidan studon de Bargellini, trafis min jena parteto, en kiu li priskribas la situacion fine de la 15-a jarcento rilate al Dante:

*"Ankaŭ la humanistoj estis ŝanĝintaj sian sintenon al la 'vulgara' poeto, kaj unu klerulo Platonizanta kiel Christoforo Landino, kiu prelegis pri retoriko en la Florenca 'Studio', instruisto de Poliziano kaj amiko de Lorenzo de Medici rajtis komentarii la poemon de Dante sen difekti sian dignon de klerulo kaj latinisto".*

Preskaŭ du jarcentoj devis forpasi antaŭ ol la tiamaj kleruloj ekkuraĝis komentarii tiun mondliteraturan ĉefverkon sen timo, ke, agante tiel rilate poemon skribitan en lingvo 'vulgara', ili kompromitos sian dignon, prestiĝon kaj reputacion. Ne estas nur Esperanto, kiu frontis kaj ankoraŭ frontas la barojn de antaŭjuĝoj kaj superstiĉoj en la mondo de kulturo ! Dante, per la potenco de sia intelekto kaj la forto de sia poezia inspiro, kreis kaj firmigis la fundamentojn de la itala lingvo kiel komuna super la lokaj dialektoj. La nuna traduko de Dante tutcerte firmigos la poziciojn de la Internacia Lingvo kaj donos al ĝi novan prestiĝon en la medioj de kulturo.

**Prof. D-ro Ivo Lapenna**

# *DAVID FRIŜMAN*

# LUMO

**(Legendo)**

Nokto. La mallumo kovris la dormoĉambron, kiel nubo de unu flanko al la alia. En malgranda lito dormas la infano, apude en la granda lito, dormas la patrino. Subite ekmovas sin la infano kaj vekiĝas — patrino mia. Ankaŭ lia patrino ekvekiĝas.

— "Kion deziras vi, infano kara ?"

— "Lumon; Lumon mi deziras, patrino mia, mi deziras ke tuj estu lumo.

Lia patrino rapidis kaj lumigis la kandelon.

Ne, patrino mia, ne kandelon mi deziras, ne lumon de kandelo, estu lumo, mi deziras, ke ekstere kaj sur la strato estu lumo, ke estu nun tago mi deziras.

Sed, mia karulo, via deziro estas neeblaĵo, nun estas nokto, kaj neniu homo en la mondo povas ŝanĝi nokton en tagon. Tion eĉ amanta patrino ne povas fari, eĉ por sia unu sola infano ŝi ne ne povas fari tion, atendu, atendu momenton, iom da pacienco, baldaŭ la tago certe venos.

Sed mi deziras ke tuj estu tago. Deziras mi ke ĉiam estu tago.

Kaj la infano ploras, kaj la virino ne povas aŭskulti la ploron de sia infano. La bruon de la flugiloj de Morto ŝi povus aŭdi trankvile, sed ne la ploron de sia filo.

Ho, Dio de la lumo, ĉion kion ŝi posedas ŝi fordonus, ke ŝia filo nur havu lumon. La patrino iras serĉi lumon por sia filo, ŝi staras sur krucvojo demandante pri la vojoj de la mondo. Aperis maljunulo.

Mi estas maljuna, la tagoj instruis al mi saĝon. La lumon vi serĉas, filino mia, lumon por via filo ? Aŭskultu kion mi diros al vi. Se la brilantajn kaj lumantajn okulojn viajn vi oferos al via filo, li havos lumon kiel vi deziras.

La virino ne atendis eĉ momenton, kaj oferis siajn okulojn al la filo. Tage kaj nokte, nokte kaj tage ŝi laboris por sia filo, ĝis ŝiaj okuloj blindiĝis pro troa nokta laboro. Sed la lumo estis nur por ŝia filo, kaj li ja deziris lumon por la tuta mondo.

Denove la virino staras sur la krucvojoj kaj demandas pri la vojoj de l' mondo.

Diru al mi, vojoj de l' mondo, de kie oni prenas lumon ? — Jen maljunulino venas renkonte : — Nun mi estas maljuna sed iam mi estis juna kiel vi, kaj estinte juna mi estis patrino kiel vi, tial mi scias: Se vi laboros ĝis viaj nokto-nigraj haroj blankiĝos kiel la tago — elŝprucos lumo el tiu blankaĵo, tiam vi havos lumon por via filo.

La patrino eĉ momenton ne hezitis. Ŝi laboris por sia filo tage kaj nokte, laboradis kaj ne ripozis ĝis pro troa laboro blankiĝis ŝia nigra hararo. La blankaĵo estis kiel la blankaĵo de diamantoj kaj lumis sepdek sep mejlojn ĉirkaŭe. Sed ankaŭ tiu lumo ne sufiĉis — tio ne estis eterna lumo kaj ne lumis por la tuta mondo. La trian fojon staras la virino kaj demandas pri la vojoj de la mondo.

— Diru al mi, kie estas la loko por preni lumon ? De la kvar direktoj venis vento kaj diris — Se la ruĝan sangon de via koro vi oferos al via filo, el tiu ruĝo fariĝos granda lumo kiel la lumo de la unuaj sep tagoj.

— La sangon de mia koro — diris la virino, kaj sen kompato eltiris la koron kaj alportis al sia filo. Kiam la koro estis ĉe la filo, la varmo estis tiel granda, kiel la sunlumo en Givon, ĝi lumis unu tagon kaj unu nokton kaj lumis ankoraŭ sep tagojn kaj la vizaĝo de la knabo lumiĝis. Sed ankaŭ tiu ĉi lumo ne estis eterna, kiu lumigos eterne, senĉese.

Denove la virino vagadas kaj demandas — Kie estas lumo ? — diru al mi, kie estas la lumo, kiu lumigos al mia filo ĉiam kaj lumigos al la tuta mondo por mia filo. Kaj jen maljunulo venas renkonte — se ĉiujn librojn de la mondo vi kolektos kaj saĝon kaj sciencon, vi havos lumon kiun vi deziras kaj vi donos ĝin al via filo.

La virino kolektas por sia filo ĉiujn librojn de l' mondo, legas ĉiujn eldonojn de la saĝuloj kaj scienculoj kaj transdonas la saĝon kaj sciencon al sia filo. La saĝeco kaj scienco havigis al la filo lumon, tre grandan lumon. Sed li rigardis eksteren kaj vidis, ke mallumo regas ekstere, ke la lumo estas nur por li mem kaj tio dolorigis lin multoble. La knabo fariĝis fraŭlo, el la fraŭlo viro — viro tre malfeliĉa, ĉar ne estas feliĉa homo kiu serĉas ĉiam lumon, unu lumon por ĉiuj homoj kune. Dum li serĉis, forpasis tagoj kaj jaroj, li laciĝis kaj maljuniĝis. Liaj piedoj doloris pro troa irado, lia koro pro troa zorgado kaj esplorado. Liaj nigraj haroj blankiĝis kaj fariĝis lumigaj kaj brilaj. Li ankaŭ havas filon kaj tiu filo deziras de li la saman deziron, kiun li mem havis dum la tuta vivo.

Intertempe venis lia lasta tago. Anstataŭ lumo, kiun li deziris, jen venis anĝelo de mallumo kun miloj da nigraj okuloj.

Subite li ekkomprenis. Monda leĝo ĝi estas. Tago kaj nokto venas sinsekve, somero kaj vintro, lumo kaj mallumo, varmo kaj malvarmo. Alparolante al sia filo ĉe la lito, li diras — Rigardu, mi serĉis la lumon, tial sufiĉas al mi, ĉar tiu, kiu serĉas la lumon, li havas ĝin por si.

El hebrea lingvo: **M. Suckever,** Israelo

# Novaj Libroj

Duope ricevitajn ni recenzas; unuope ricevitajn ni nur mencias.
*) ricevebla ĉe U.E.A.

**ORIENTO KAJ OKCIDENTO, de Georges FRADIER, Elangligis C.D.A. CAPP. Eldonis UEA kun helpo de UNESKO, Rotterdam, 1962. 50 p. k 8 tutpaĝaj fotoj, 21,5 × 13,5 cm. Prezo: 1,50 gld. (6 steloj). Broŝurita.***

La Granda Projekto de UNESKO pri Reciproka Aprezado de Orientaj kaj Okcidentaj Kulturaj Valoroj estas dekjara entrepreno lanĉita en la fino de 1956-a jaro. Nur tri jarojn poste aperis tiu ĉi fundamenta informilo por iom vasta publiko en lingvoj angla kaj franca; nur post pliaj tri jaroj ĝi eldoniĝas jen en Esperanta vesto. Ĝin leginte, mi bedaŭras tiun malfruiĝon, ĉar mi konstatas, ke ĝi donas celutilan direktiĝon al multaj Esperantaj rondoj dezirantaj laŭ sia kapablo kontribui al la Projekto. Ke tamen, post tioma malfruigo, UNESKO decidis subvencii Esperantan eldonon, tio estas kontentiga signo pri plifirmiĝo de rilatoj inter UNESKO kaj UEA.

## KONSCIE "ELOKCIDENTA"

Tiun ĉi libron verkis okcidentano. Neeviteble do ĝi rigardas la problemon el okcidenta vidpunkto : oni ĉefe demandas: kiel konatigi Orienton al Okcidento ? Por pravigi tiun sintenon, oni atentigas, ke orientanoj jam akiris grandan konon pri la alia terduono el ĝiaj tekniko kaj produktaĵoj. Iagrade tio povas esti vero; tamen mi ne povas krom dubi, ĉu efektive hindo, ekzemple, pli bone komprenas francajn penson kaj motivojn, ol inverse. Oni almenaŭ sentas, ke ankoraŭ devas veni ia komplementa vidpunktesprimo el Oriento: ĉu eble troviĝos por tiu temo originala verkonto en nia lingvo ?

En alia rilato tiu manko de monda vidpunkto estas ja neevitebla antaŭ fina akcepto de monda lingvo. La verkinto ekzemple plendas (atentinde), ke fakte jam abundas en lingvoj angla kaj franca tradukoj el orientaj literaturoj, sed ke tiujn materialojn oni ne sufiĉe aĉetas aŭ ne sufiĉe legas. Ĉu eble ĝuste pro tio, ke tradukite en alian **nacian** lingvon ili fariĝis kvazaŭ anglaj aŭ francaj verkoj duarangaj, sed ke tradukite en **internacian** lingvon ili estus egalrajtaj eroj de internacia kulturo ?

## KIO ESTAS "VALOROJ"?

Tiuj du trionoj de la verko, kiuj pritraktas laŭ historia k.a. aspektoj rilatojn inter Oriento kaj Okcidento, estas plenŝtopitaj per solidaj faktoj interese prezentitaj. Malpli alloga kvankam utila estas tiu parto pri agado entreprenita de UNESKO enkadre de la Projekto. Laŭ mia gusto ĉefe mankas nur ia pli fundamenta prifosado pri tiu koncepto de "valoroj": ne temu tiom pri artaj valoraĵoj, kiom pri viv-konceptoj kaj -celoj, kiujn ili povas konatigi, pri tiuj kulture fiksitaj motivoj, kiuj regas nian tutan vivon. La esencaj kulturaj valoroj estas tiuj aferoj, kiujn ni rigardas la plej gravaj en la vivo — ĉu por ĉinino: naski filon, ĉu por anglino: enamiĝi, ĉu por hindo: plenumi siajn familiajn devojn — kaj sen ekkono de tiaj valoroj povas ekesti nenia daŭra kompreno.

S-ro Capp sukcesis — kun escepto de kelkaj, ĉefe leksikaj anglaĵoj — redoni glate la originalan stilon.

**V. Sadler** (Okcidento)

☆

## PENSPROVOKA LIBRO

La antikvaj kaj novaj kulturvaloroj abundas en ĉiuj partoj de la Oriento, sed iliaj malkovroj estis faritaj nur malmulte de la Okcidento. Bedaŭrinde la plejparto de la Orientaj landoj estas subevoluintaj laŭ la materia normo, kaj la sinteno de la Okcidento al ili estas — mi kuraĝas diri — konscie aŭ nekonscie "degna". Pro tio okazas, ke eĉ post kiam la Oriento malfermis la pordon, ĝi ankoraŭ restas "senfine kompleksa enigmo, kiun nur specialistoj sukcesas deĉifri" kaj oni "scias, ke estas eble resti tie dum longa tempo kaj kompreni nenion". Tio validas ankaŭ por la eŭropanoj loĝantaj ekzemple en Japanujo. Mi povas diri, ke la 'psikologiaj bariloj' aŭ la 'nepenetrebla sojlo' kuŝas ne tiom en la 'aziaj mensostatoj' mem kiom en la eŭropaj: ili ĉiam fremdule vivas inter japanoj, malgraŭ la komplezema kaj eĉ sincera miksiĝo kun ili (Vidu ilian hejmon !). Kaj kiom pli oni povus atendi de la rapidaj vojaĝantoj kaj turistoj ?

"Pli ol duono de ĉiuj homaj estaĵoj estas aziaj, orientaj". Kaj ties plimulto vivas subnivele; multaj eĉ malsate. Por ili la 'kulturo' aŭ 'civilizo' estas io plej malproksima. En ĉiuj aziaj landoj, kies nacia politiko devas esti "neŭtrala", neeviteble okazas, ke la modernstila teksejo investita de unu grandpotenco staras apud la same moderna hospitalo donacita de la alia, kaj la nova aŭtovojo trakuras la agrarajn distriktojn kun kabanoj kaj bubaloj. Sed neniu povas garantii, ke tiu vojo ne estos uzata morgaŭ por la trafiko de kirasitaj kamionoj, tankoj kaj municioj. En tia strečita atmosfero, la tempo ŝajnas plej malproksima, kiam "popoloj, kiel individuoj, povas reciproke kompreniĝi nur kiel egaluloj" — malgraŭ la agnosko de ĉiuj pensuloj de nia jarcento.

Sed tia problemo apartenas pli multe al la kampoj politika kaj ekonomia, ol al la eduka kaj kultura, por kiuj estas dediĉita la libro "Oriento kaj Okcidento" kiel protagonisto de Unesko.



*Ilustraĵo el "Oriento kaj Okcidento" (Foto : UNESCO - Marc Riboud).*

La aŭtoro donas al ni koncizan bildon pri la kontaktiĝo de Oriento kaj Okcidento, citante la historiajn faktojn ekde la malnova tempo ĝis la Renesanco; akcentas la eblecojn de la nuntempo por la interŝanĝo de la kulturaj valoroj, kiuj, interalie, estas "tradukeblaj kaj transdoneblaj" kaj urĝigas la tradukadon de la romanoj, la poezio kaj la dramo de la Oriento.

Se ni ne rajtas diri, ke la Oriento jam konas pli profunde la Okcidenton, ni povas almenaŭ diri, ke la Oriento senkompare pli multe tradukis kaj lernas la Okcidenton, ol inverse. Ekzemple, "kelkaj Eŭropanoj estis ravitaj de *La Romano de Genĵi,* sed milionoj da Japanoj legis la verkojn de Ŝekspiro, Gibbon, Goethe, Dickens kaj Zola" — se ne aldoni milojn da aliaj verkoj tradukitaj el la Eŭropa literaturo klasika, moderna kaj nuntempa, kaj disponigataj ankaŭ al la instruitaj azianoj, kiuj scipovas la japanan lingvon. En tiu senco la Okcidento estas "subevoluinta" kaj multe postrestanta.

Por ke la Okcidento pli bone komprenu la Orienton, ĝi mem devas multe klopodi, ĉar se temas pri la tradukado de la Orienta literaturo en la Eŭropajn lingvojn, orientanoj povas fari malmulton, krom asidue kunlabori, eksplikante al la tradukantoj la nuancojn ktp. de la originalo.

**T. Nakamura** (Oriento)

## RICEVITAJ ELDONAĴOJ

**Logiko** de MARTINUS, eldanigis Ib SCHLEICHER, eld. Martinus-Instituto, Kopenhago, 1962. 200 p. 25 × 18 cm., bindita. Kelkaj ilustraĵoj. Prezo 11,50 gld. (46 st.). Baza traktaĵo de la Martinus' a ismo.

**SAT-Jarlibro 1962-3,** eld. Sennacieca Asocio Tutmonda, Parizo, 1962. 144 p. 15 × 11 cm.

**Kampadejo de Pacamikoj** sur la bordo de Adriatiko, eld. Kroata Naturscienca Societo, Zagreb, 1962. 48 p. 23,5 × 17 cm., ilustrita. Kolekto de rekomendaj informoj kaj leteroj, kun paralela teksto serbokroata. Senpaga ?

**Resumoj kaj Klarigoj** el la jarlibro 1962 de Instituto por Biologia kaj Kemia Esploro de Agrikulturaj Plantoj, Wageningen; trad. G. F. MAKKINK. 33 p. 21,5 × 16,5 cm. Inkluzivas unupaĝan glosaron.

**Die Zukunft hat schon begonnen!** Eld. Germana Studenta Esperanto-Ligo, 2 Hamburg-Altona, Keplerstr. 33, Germanujo. 20 p. multobligitaj, 29,5 × 21 cm. Prezo 1,5 st. Ampleksa, ĝisdata informilo germanlingva.

**La muelejoj de la meti-lernantoj.** Eld. Le Moulin des Apprentis BONNAT (Creuse), C.C.P. 481-72, Limoges, Francujo. 16 p. 17 × 12,5 cm. Prezo 3 st. Ilustrita broŝuro pri franca laborbrigada organizaĵo.

**SERĈATA:**
**REMEMOROJ DE SOLFÉRINO**
**de Henri Dunant**

eldonita en 1906

En kunligo kun la ĉi-jara jubileo de la Ruĝa Kruco, tiu organizaĵo deziras **prunti** aŭ aĉeti por ekspozicio la supre menciitan Esperanto-tradukon de la konata verko de sia fondinto.

Kiu posedas kaj bonvolas disponigi ĝin ? Kun informoj oni turnu sin al la Centra Oficejo de U.E.A., Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

## LA 50-a EN TOKIO

Reage al la ĉefartikolo kaj aliĝilo en la januara numero de "Esperanto" alvenis en la C.O. jam pluraj kotizoj kaj aliĝiloj por Tokio. Ĉiu, kiu serioze intencas partopreni tiun kongreson, profitu la favoran kotizon de la unua periodo!

Por la internacia aviadila vojaĝo organizata de U.E.A. provizore anoncis sin tiom da personoj, ke unu granda aviadilo jam estos plena, se ĉiuj definitive anoncos sin. Ĉiuj, kiuj deziras principe partopreni tiun vojaĝon, anoncu sin baldaŭ, por ke oni povu ev. plani duan aviadilon.

Ankaŭ la ŝpareblecojn multaj utiligas. Grandaj sumoj jam kuŝas sekure en banko kaj la posedantoj rericevos ilin en 1965 kun rentumo.

Ne maltrafu ĉi tiun unikan kongreson ! Bezonata sumo entute inter 2500 kaj 3000 gld. (10.000—12.000 steloj). Petu ĉiujn informojn de la Centra Oficejo de U.E.A., Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam, Nederlando.

# FORUMO

### AZIA STRATEGIO

Via artikolo "Azia Strategio" ŝajnis al mi realisme verkita, kaj ĝi tre interesis min. Vi ĝuste rimarkis, ke la alternativo (c)-instruo nacilingva, legaĵoj anglaj — jam ekzistas en Eŭropo —, vi menciis Danujon, mi aldonas Nederlandon kaj verŝajne diversajn aliajn landojn. Tio do koncernas la universitatojn —, kaj apud la angla estas malplimulto de germana literaturo. La situacio tendencas ĉiam pli "imperiismiĝi", laŭ via termino (alternativo a), ĉar instruado **per** angla, germana kaj eventuale franca lingvoj en la lernejoj de la malgrandaj eŭropaj ŝtatoj ĉiam pli estas konsiderata, kaj praktikata. Via indikita solvo: Esperantaj legaĵoj kaj eventuale (sed tio ne estas nepre necesa, ŝajnas al mi) nask-lingva instruado, estas efektive racia ideo. Bedaŭrinde, efikeco, logikeco, racieco ne estas ĉiam la decidaj faktoroj en la historio. Se jes —, esperanto jam estus atinginta siajn celojn. Nur imagu, kiel reagos la anglalingvaj grandŝtatoj. Ĉu ili rezigne agos ? Aŭ ĉu la miloj da instruistoj, propagandistoj, la multega ekonomia helpo rekte ligita al la angla lingvo simple akceptus la malvenkon ?

Kaj eĉ sen intenca deviga premo de ekstere, la angla lingvo estas tiel asociata al "lukso", "prospero", "riĉo", ktp., ke tute memvole la homoj lernas ĝin. Ĝi havas brilan prestiĝon, kiu absolute mankas al Esperanto. Tiel estas en Nederlando (la anglaj kursoj abundas de personoj, kiuj fakte ne bezonas la lingvon), tiel estas en Afriko. (Mi informiĝis ke en eksfrancaj kolonioj la malnovaj francaj institucioj regresas, koste de junaj, energiaj angla-instruaj institucioj. Ne daŭros longe, antaŭ ol la angla gajnos la konkurencon kun la franca en Afriko !)

**H. Bakker (Amsterdam)**

Fakte jam de longe mi formis al mi la ideon, ke ni devus havi bazajn sciencolibrojn (bazaj ... por komenci) en Esperanto por ĉiuj branĉoj. Ili estus eldonitaj de la partoprenantaj ŝtatoj el Azio kaj Afriko, kiuj povus ilin interŝanĝi. Sed nun — piede de l' muro — kion fari ? La muro estas altega ! Rezigni ? Atendi, ĝis Esperanto estos jam oficiale rekonita en Eŭropo (Interŝtata Konvencio pri Instruado) ? Ŝajnas al mi, ke en la hodiaŭaj eblecoj restas nur unu vojo : kampanjo por la plimultigo de la popularsciencaj verkoj, paralele kun granda helpo de UEA (+ instigo !) al publikigo de sciencaj (kaj aliaj) terminaroj. Ambaŭ paralele marŝantaj povus helpi al kreo de la unua grundo, sur kiu povos pli disvolviĝi poste alia kategorio de libro: la baza scienca libro, kun fakultata nivelo. Tion ni povas entrepreni: konstruo de skafaldo por suriri la muron !

**A. Albault (Toulouse)**

# Lastaj Novaĵoj el Afriko



**Intervjuo kun Hans Grossmann**

Kiam antaŭnelonge vizitis la redaktejon S-ro Hans Grossmann, juna svisa membro ĝisnuna de la Karavano de Amikeco (v. nian novembran eldonon, p. 190) ni tuj faris al li kelkajn demandojn. Jen liaj respondoj.

*Ĝis kie do la Karavano progresis nun ?*

Jam pli frue ni raportis pri nia vojaĝo tra Turkujo, Sirio, Libano, Egiptujo, Sudano, Etiopio kaj Somalio. Poste ni trapasis Kenjon, kaj atingis Tanganjikon. En la momento, kiam mi forlasis ĝin, la Karavano estis ĉe la urbo Dar-es-Salaam (la nomo signifas : Paca Marbordo).

*Ĉu efektive la karavananoj uzas Esperanton ?*

La polaj membroj estis jam bonaj E-istoj kaj F-ino Munitz el Kimrujo surprizis min per siaj rapidaj progresoj en konversacio. Bedaŭrinde la jugoslavaj membroj (krom Tibor Sekelj, kompreneble !) ne havis persistemon por akiri la lingvon.

*Kiel la Afrikaj popoloj kaj gazetaro akceptis vin ?*

Unue pri la gazetaro: kie ajn ni kontaktis redaktejon, ni trovis grandan interesiĝon pri nia entrepreno. Ni aperis en Kenja televido nur unu semajnon post ĝia inaŭguriĝo. Aperis pluraj gravaj artikoloj en Egiptujo, Etiopio kaj Kenjo. En ĉi-lasta aperis unu artikolo kun titolo "Karavanon de Amikeco atakis banditoj !".

Due pri la popolo: parolante pri popolo, oni devas fari diferencon inter oficialuloj kaj privatuloj. Ekzemple en Somalio, la polico donis al ni permeson foti kaj filmi, sed malgraŭ forta eskorto, la popolamaso sur la vendoplaco ĵetis ŝtonojn al ni. En Etiopio, aliflanke, ni estis ĉiam tre amike ricevitaj, krom la incidento kun la banditoj. En Kenjo ni povis vere kontakti ankaŭ simplajn homojn, dank' al tio, ke Tibor estis studinta sŭahilian lingvon. La plej simpatiajn homojn laŭ mi ni trovis en Tanganjiko; ni trovis tie gajan, paroleman kaj helpeman popolon.

*Kiuj laŭ vi estis la plej utilaj kontaktoj por E ?*

Ni kontaktis la ministeriojn de edukado en Egiptujo kaj en Sudano. La utileco de tiuj kontaktoj estas tamen duba. Pri prelegoj en universitatoj S-ro Sekelj jam raportis.

En la postaj landoj ni pro materiaj bezonoj pli akcentis la kontakton kun informministerio, iom neglektante la propagandon por E.; en Najrobi ni hazarde trovis nove alvenintan Esperantiston, S-ron Martin.

*Kial vi mem revenis jam Eŭropon ?*

Pro financaj malfacilaĵoj la grupo devis reduktiĝi, kaj ĉar mi hazarde trovis laboron sur belga ŝipo mi povis reveni senĝene.

*Kiom da anoj nun restas en Dar-es-Salaam ?*

Estas Tibor, Jovo, Branko, Olgerd, Jerzy, kaj F-ino Jo; do ses.

*Kaj fine, kien ili celas nun ?*

Estas oficiala invito al Madagaskaro, sed ne por ĉiuj membroj. Ĉiuokaze, la venonta lando estos Ugando. Nenio estas certa. Estas ankoraŭ ĉiam la plano, reveni al Eŭropo por la UK en Sofio.

# CED

**Centro de Esploro kaj Dokumentado**

**77, Grasmere Avenue, WEMBLEY, Middlesex, Anglujo Telefono ARNold 90-81**

## STRATOJ AŬ PLACOJ KUN LA NOMOJ D-RO ZAMENHOF AŬ ESPERANTO

En la Esperanto-gazetaro jam kelkfoje aperis listoj de stratoj aŭ placoj laŭ la nomo de D-ro Zamenhof aŭ Esperanto. Krome, daŭre aperas informoj pri novaj stratoj aŭ placoj, kiuj ricevis tiujn nomojn. Montriĝis, ke pluraj informoj ne estas ĝustaj kaj tial CED komisiis sian kunlaboranton, s-ron R. Pennazio, ellabori statistikon kun precizaj informoj pri ĉiuj placoj aŭ stratoj, kiuj nuntempe nomiĝas "D-ro Zamenhof" aŭ "Esperanto". S-ro Pennazio ĵus finis la laboron kaj CED sendos la kompletan liston al ĉiuj landaj organizaĵoj kaj iliaj informaj fakoj per interna dokumento. Ĉi tie ni publikigas nur la resumajn ciferojn:

Laŭ la stato je la 31-a de oktobro 1962, en 19 landoj entute estis 217 stratoj aŭ placoj kun la nomoj Zamenhof aŭ Esperanto. Laŭ la landoj la statistiko montras jenan staton: Argentino 5, Aŭstrujo 6, Belgujo 3, Brazilo 33, Britujo 1, Bulgarujo 21, Ĉeĥoslovakio 2, Francujo 43, Germanujo 19, Hispanujo 10, Hungarujo 11, Italujo 23, Izraelo 5, Jugoslavio 2, Kanado 1, Nederlando 13, Pollando 16, Soveta Unio (Litovujo) 2, Svedujo 1. Kiel oni vidas, Francujo estas la plej forta tiurilate, sekvas Brazilo, Italujo, Bulgarujo kaj aliaj landoj.

## ESPERANTLINGVAJ RADIOELSENDOJ EN 1962

Laŭ la statistiko, kiun ellaboris s-ro G. Larglantier, kunlaboranto de CED por la radio, la nombro de ĉiuj radio-elsendoj en 1962 estis entute 1677 kompare kun 1485 en 1961. La kresko en la nombro de elsendoj do estas 192. Entute 20 stacioj en 13 landoj, kompare kun 15 stacioj en 12 landoj en 1961, elsendis programojn en la Internacia Lingvo. Kiel en la antaŭa jaro, kaj same en la jaro 1960, la rekordon havas radio Varsovio kun 365 programoj, kiuj daŭris 182.30 horojn; sekvas Rio de Janeiro kun 156 programoj, kiuj daŭris 65 horojn, Romo kun 156 programoj en la daŭro de 39 horoj kaj Sofio kun 104 programoj en la daŭro de 43.20 horoj. En la statistiko ne estas enkalkulitaj la sporadaj, neregulaj elsendoj, tiel ke la supraj ciferoj ne prezentas precize la nombron de la Esperanto-programoj. CED petis s-ron Larglantier noti en tiu ĉi jaro ankaŭ la sporadajn elsendojn, tiel ke la bildo por 1963 povos esti pli kompleta. La landaj asocioj kaj la lokaj grupoj en urboj kun radio-stacioj povas utiligi la jam ekzistantajn Esperanto-elsendojn por apogi siajn klopodojn enkonduki la lingvon por la programoj de la radio-stadioj, kiuj ankoraŭ ne utiligas Esperanton.

## INSTRUADO DE ESPERANTO EN LA LERNEJOJ EN 1962/1963

S-ro D. Kennedy, kiu en la nomo de CED ellaboras la statistikon pri la instruado de la Internacia Lingvo en la lernejoj en tiu ĉi lerneja jaro, informas, ke jam multaj geinstruistoj resendis la plenigitan demandaron, sed ke granda nombro ankoraŭ ne reagis. CED atentigas, ke alvoko kun precizaj informoj kaj teksto de la demandaro aperis en la decembra numero de "Esperanto", 1962, sur la p. 208. Krome, presitaj poŝtkartoj kun la demandaro estis senditaj al ĉiuj lernejoj, en kiuj la lingvo estas instruata, se la adreso estis konata. CED varme petas ĉiujn geinstruistojn helpi la ellaboron de la trarigardo per tuja respondo al la demandaro, kiun oni bonvolu sendi antaŭ la 1-a de aprilo al s-ro *D. Kennedy, 21 Westfield Road, Bishop Auckland, Co. Durham, Britujo.* CED ankaŭ petas la landajn asociojn, lokajn grupojn kaj unuopajn esperantistojn atentigi la geinstruistojn pri tiu ĉi enketo kaj la alvoko.

**Donacoj por CED**

| | £ ŝ p |
|---|---|
| La Stato je la 3-a de decembro 1962 . . . . | 207-16-3 |
| S-ro B. B. Beaumont, Britujo . . . . . | 2- 0-0 |
| S-ro L. Minnaja, Italujo . . . . . | 5- 0-0 |
| D-ro Nestore Tursi, Italujo . . . . . | 5- 0-0 |
| S-ro P. Bouvier, Svislando . . . . . | 2- 1-5 |
| Stato je la 31-a de decembro 1962 . . . . . | 221-17-8 |

CED tutkore dankas al ĉiuj, kiuj subtenis finance ĝian laboron en la jaro 1962. Kiel oni vidas, la tuta sumo de donacoj en 1962 estis £ 221-17-8 kompare kun la sumo de £ 95-4-0 en la antaŭa jaro. CED komprenas tiun altigon en la sumo de la donacoj ne nur kiel gravan financan helpon, sed ankaŭ kiel aprobon por ĝia laboro kaj kuraĝigon por la estonteco. Ĉi-foje CED direktas apartan dankon al Gesinjoroj Minnaja el Romo pro la konstantaj donacoj, kiujn ili faras al CED. La donacojn, ricevitajn en la jaro 1963, ni publikigos en la sekvanta numero.

---

**"Esperanto Scientific News", nova publikaĵo en Usono.** Esperanto Scientific Center starigita en Nov-Jorko en januaro 1962 por larĝskale disvastigi Esperanton en Usono inter la sciencaj kaj universitataj sferoj, kaj ĉe UNO, ekpublikigis trimonatan (dekomence, poste monatan) revuon dulingvan (E kaj angle).

La publikaĵo estis urĝa neceso, kaj servas duoblan rolon: unue, ĝi estos grava propagandilo pere de 1000 ekzempleroj sendataj senpage al la sama nombro da selektitaj universitataj, kulturaj kaj sciencaj revuoj en la orientaj ŝtatoj de Usono (dum la unua periodo; poste tra la tuta lando, kiam la nombro de abonantoj kreskos); kaj due, ĝi estos utilega informilo por la tutmonda E-istaro rilate la agadon en Usono de E.S.C.

**Esperanto Scientific News,** 130 West 57th St. (6-B), New York 19, N.Y., Usono.

Abonprezo: Usono kaj Kanado, $ 1.75 jare. Aliaj landoj, $ 2.00 (Aŭ 23 kaj 26 steloj, respektive).



# Bulgarujo

**En la inaŭgurejo**



**Sofia Operejo**



**Ŝtonarbaro**

**Monumento al la liberigintoj en Sofio**

**Rodopimontaro**



**Hotelo ĉe Borovec**





48-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

SOFIO 3-10 VIII 1963

Sub la Alta Protektado de la Unua Viĉefministro de Bulgarujo, Georgi Trajkov.

Konstanta Adreso: U.E.A., Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

## OFICIALA KOMUNIKO

N-ro 8

Rotterdam, la 21-an de jan. 1963

**Konkurso pri deklamado.**

En la kadro de la Dua Internacia Arta Festivalo okazos konkurso pri deklamado. La interesiĝantoj bonvolu sin anonci kiel eble plej baldaŭ ĉe la konstanta adreso de la Kongreso, sendante samtempe specimenon de sia deklammaniero, surbendigita.

**Infana Kongreseto.**

En la kadro de la 48-a Universala Kongreso okazos la 8-a Internacia Infana Kongreseto. Rajtas ĝin partopreni infanoj de 6 ĝis 13-jaraj, kiuj kapablas bone paroli Esperanton. La kotizo, kiu inkluzivas manĝon, dormon, ekskursojn kaj aliajn manifestaciojn, estas 35.— ned. gld. Du aŭ pluraj infanoj de la sama familio pagas po 30.— ned. gld.

Detalaj informoj kaj aliĝiloj estas haveblaj ĉe la konstanta adreso de la Universala Kongreso.

**Adoptaj Gepatroj.**

Por helpi al esperantistaj infanoj el landoj malproksimaj aŭ kun malfortaj devizoj, la Loka Kongresa Komitato starigis ankaŭ ĉijare la fondaĵon "Adoptaj Gepatroj", kun kotizo de 30.— ned. gld. La ricevitaj sumoj estos utiligitaj por pagi la vojaĝ- kaj restadkostojn al tiuj infanoj.

**Statistiko** (ĝis (21/1/1963):

Arabujo 1, Argentino 1, Aŭstralio 2, Aŭstrujo 16, Belgujo 30, Brazilo 2, Britujo 64, Bulgarujo 423, Ĉeĥoslovakujo 1, Danlando 38, Finnlando 35, Francujo 188, Germanujo (okc.) 68, Germanujo (or.) 12, Hispanujo 6, Hungarujo 6, Islando 2, Israelo 1, Italujo 79, Japanujo 4, Jugoslavio 21, Kanado 2, Madagaskaro 1, Meksikio 4, Monako 3, Nederlando 89, Nigerio 2, Norvegujo 8, Nov-Zelando 3, Pollando 26, Sovetunio 11, Svedujo 79, Svisujo 7, Usono 5. Entute 1241 el 34 landoj (pasintjare 741 el 31 landoj).

Konstanta Kongresa Sekretario
G. G. Pompilio

## ĈE-SEMINARIO EN SOFIO !

Por tiuj, kiuj neniam ĉeestis tian seminarion de s-ro Cseh, mi volas klarigi, ke ĝi estas destinita por jam progresintaj esperantistoj, kiuj deziras mem instrui laŭ tiu metodo. Dum la seminario s-ro Cseh montras la karakterizajn partojn de la kurso kaj samtempe klarigas la metodon. La ĉefa trajto de la kurso estas la daŭra bonhumoro, kiu regas dum ĉiuj lecionoj. Ŝajne ĝi estas nur amuzaĵo — efektive por la lernantoj — sed la instruisto havas pezan laboron, interalie li ne rajtas uzi vortojn, kiujn la lernantoj ankoraŭ ne lernis.

Preferinde estas, ke la instruisto estu alilandano, por ke la kursanoj ne havu la tenton uzi sian hejman lingvon. La lernantoj ne bezonas havi lernolibron, nur kajeron, en kiun ili notas la lernitajn vortojn kaj regulojn. Interesa estas ankaŭ la fakto, ke la kursanoj ĉiam respondas ĥore al la demandoj de la instruisto, tiel ke ili kuraĝas tuj paroli.

Resume, la karakterizaj principoj de la metodo:

1) Konversacia metodo, sen uzo de lernolibro, simila al la maniero, en kiu infanoj lernas la patrinan lingvon.
2) Instruado de la vortoj per montrado de objektoj kaj agoj, sen uzo de nacia lingvo.
3) Kvankam la kursmetodo estas konversacia, tamen oni lernas ankaŭ la gramatikan sistemon, kiu kvazaŭ konstruiĝas antaŭ iliaj okuloj de leciono al leciono. La lecionoj estas tiel prezentataj, ke la lernantoj mem eltrovas la gramatikajn regulojn.
4) La evito de la kutimaj lernejaj ekzemploj. La konversacio kun la lernantoj okazas en interesa kaj bonhumora maniero, tiel ke ĝi daŭre tenas la atenton.

*Andreo Cseh instruas*

La seminario okupos 15 horojn dum la kongresa semajno, sed tiel, ke la lecionoj ne okazos samtempe kun la ĉefaj aranĝoj, tiel ke la seminarianoj povu ĉeesti ĉiujn gravajn kunvenojn, festojn, k.t.p. La kotizo estas 12 ned. guldenoj, sendotaj samtempe kun la aliĝilo al la konstanta adreso de la Kongreso: Centra Oficejo de U.E.A., Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2. (Pĉk. 378964 aŭ Banko: Mees en Zoonen, ROTTERDAM), aŭ al la kongresa peranto. Bulgaroj sendu la aliĝilon al: 48-a Universala Kongreso de Esperanto, P.K. 44, Sofio, kaj la kotizon al la konto de la 48-a U.K. ĉe Bulgara Nacia Banko, Sofio. Konto N. 105 r/2993. Aliĝiloj riceveblaj ĉe la konstanta adreso de la kongreso. La horaro de la seminario troviĝos en la kongresa libro.

*Julia Isbrücker*

## FOTO-KONKURSO DUM LA 48-a U.K.

1) En la kadro de la 48-a Universala Kongreso en Sofio okazos Foto-Konkurso.
2) La temo de la Foto-Konkurso estas: "La Homo".
3) Rajtas partopreni la Konkurson ĉiu organizita esperantisto.
4) La fotoj devas havi jenajn minimumajn formatojn: kategorio blanka-nigra — 13 × 18 cm.; kategorio kolora — 9 × 12 cm. Ĉiuj fotoj devas esti muntitaj sur kartoneto kun minimuma marĝeno de 4 cm. Sur la dorsa flanko de ĉiu foto devas esti skribita la pseŭdonimo de la konkursanto. Aldone al la foto, en fermita koverto, devas esti sendita la kompleta nomo kaj adreso de la konkursanto kaj sur la koverto estu la sama pseŭdonimo kiu troviĝas sur la dorsa flanko de la foto.
5) Al ĉiu foto sendita oni devas aldoni 2 respondkuponojn. Por konkursantoj el landoj kie respondkuponoj ne estas haveblaj la partopreno estas senpaga. La fotojn kaj respondkuponojn oni sendu al: 48-a Universala Kongreso de Esperanto (Foto-Konkurso), P.K. 44, Sofio, Bulgarujo. La limdato por alsendo de la konkursaĵoj estas la 20-a de julio 1963.
6) Ĉiuj premiitaj fotoj kaj aliaj, kiujn la juĝkomisiono opinias interesaj, estos ekspoziciitaj en la Kongresejo.
7) De ĉiuj premiitaj fotoj Universala Esperanto-Asocio akiros la kopirajton.
8) La 48-a U.K. zorgas por la bona konserviĝo de la ricevitaj fotoj, sed ĝi ne respondecas pri perdo aŭ difektiĝo.
9) La nepremiitaj fotoj estos resenditaj kontraŭ pago de la sendkostoj.
10) La Ŝtata Entrepreno "Bulgara Fotografio" kaj la "Bulgara Fotoklubo" kunlaboros en la organizado de la Konkurso. Premioj por la unuaj gajnintoj estas antaŭviditaj.

# Tra la Mondo

### Aŭstralio

● **De Internacia Geografa Asocio** la landa sekcio okazigis Unuan Esperanto-Semajnon (prelegoj, kursoj, filmado) dum januaro kun 20 partoprenantoj.

### Bulgarujo

● **Nova lektoro** de Esperanto estas S-ro Bejko Markov. Ekde 24.10.62 li instruas **fakultative** Esperanton al 2 grupoj de po 25 studentoj dum po 2 horoj semajne en Supera Ekonomi-financa Instituto, Sviŝtov, laŭ nova decido de la Akademia Konsilantaro.

### Francujo

● **La biologo Jean Rostand** "esperas, ke la momento ne estas malproksima, kiam ĉiuj homoj, dank'al esperanto, kapablos interkomunikiĝi same kiel faras, per siaj dancoj, ĉiuj abeloj . . ."

### Germanujo

● **La ĉefministro de Bavarujo** estas Honora Protektanto de la 41-a Germana Kongreso, 10-13.5.63, en turiste vizitinda Würzburg. Eksterlandanoj aliĝas senpage. Aliĝilojn kaj kongresajn glumarkojn (40 ekz. por 4 steloj) dissendas K. Weller, 87 Würzburg, Huttenstr. 3.

● **Helpu** la proponon de E-grupo Walsrode, nomigi du novajn stratojn "Esperantostrasse" kaj "Dr.-Samenhof-Strasse", skribante kelkajn salutvortojn al la urba konsilantaro: Stadtrat, 303 Walsrode, Germanujo.

### Hindujo

● **Por Bengala Esperanto-Instituto** fondota estas jam aĉetita tero apud Ŝantiniketan, la universitato de Rabindranath Thakur. La institutoplano antaŭvidas bibliotekon, legoĉambron, kursojn en vilaĝoj, ktp. Kiu deziras kontribui al la fondaĵo, tiu kontaktu S-ron L. Sinha, Vinaya-Bhavana, P.O. Ŝantiniketan, W. Bengal.

● **90 personoj** ĉeestis Zamenhoffeston en Delhia Publika Biblioteko. Hindie parolis S-ro G. L. Sabharwal, angle S-ro N. C. Narasingham, vicprezidanto de Hinda Instituto de Esperanto. Ĝia prezidanto, S-ro S. S. Mahant, parolis pri la granda afableco, kiun li trovis inter eŭropaj Esperantistoj. S-ino Haudebine disdonis atestojn de Cseh-Instituto al 15 personoj sukcesintaj en la unua elementa ekzameno aranĝita en Hindujo de H.I.E. Paralele kun la festo okazis ekspozicio de Esperanto-libroj el la kolekto de la publika biblioteko, kaj de aliaj Esperantaĵoj.

### Hispanujo

● **La literatura premio** Comella-Bassols pludaŭros ankoraŭ post la morto (en decembro 1962) de sia fondinto, S-ro Jacint Comella-Mora, laŭ lia malavara testamento.

### Italujo

● **Nova Esperantologia** revuo en itala lingvo, **Rivista Italiana di Esperanto,** celas informi en sciencaj k.s. medioj per seriozaj studoj kaj dokumentaĵoj. Abono: 10 rpk/14 st. jare (2 eldonoj); adreso: Piazza Napoli 40, Milano, Italujo.

### Japanujo

● **Pri la organizo de la 50-a UK** en Tokio konsilojn donis F-ino Matsuoka Yoko, organizintino de la PEN-Konferenco en 1957, kaj reprezentantoj de Japana Scienca Konsilantaro, dum simpozio ĉe la 49-a Japana Kongreso de Esperanto.

● **Prepare al la 50-a UK** pli ol 300 gejunuloj, inter kiuj gestudentoj el ĉ. 20 universitatoj, partoprenis dum la jaro 1961-2 renkontiĝojn por "disciplinado" en parola uzo de la lingvo.

● **Parton de "Otelo"** kaj komedion de Nuŝić, "La Butono" prezentis ĉe la 49-a Japana Kongreso gejunuloj kaj gestudentoj.

### Jugoslavio

● **"Homo kaj Kosmo",** nova kvaronjara popularscienca revuo ilustrita, jam lanĉiĝis. La unua eldono, 32-paĝa kajero kun kolora kovrilo, enhavas i.a. artikolojn de Divjanović, Popović kaj Mikuličić. Adreso: ZAGREB, Opatička 22, pf 165. Jarabono 20 steloj.

### Nederlando

● **La Internacia Junulara Centro** ĉe Anne-Frank-Domo, Amsterdam, aranĝis prelegon kaj Ĉe-metodan kurson de S-ro S. Pragano, kiu ampleksos entute 32 lernohorojn, ekde 5.2.63.

### Nov-Zelando

● **Ĉirkaŭ 50** personoj ĉeestis la 28-an Nov-Zelandan Kongreson, Hawera, 28.12.62 - 1.1.63, inter kiuj vizitantoj el Anglujo kaj Nederlando. La kongreso raportis, ke ĉ. 1000 geknaboj lernas Esperanton en 16 lernejoj, ke 40 geinstruistoj eklernis ĉe Dunedin, kaj ke la Asociaj financoj estas kontentige fortaj.

### Pollando

● **La unuan fojon** Esperanto estas deviga lernobjekto en pola liceo: nome en Sosnowiec, kie mgr Maria J. Krausowa gvidas kvar klasojn laŭ ministeria permeso. La unua abiturienta ekzameno pri Esperanto okazis en 1962 — kun televida prezento. Rezultis artikoloj kaj radio-intervjuoj. Intervjuate, la Prezidanto de Pola Popola Respubliko, Aleksander Zawadzki, deklaris: "Esperanto estas lingvo tre utila, ĝi havas multajn entuziasmajn adeptojn. — Lernu do Esperanton."

# Laŭfake

### Belarto

● **Norda Prismo,** nia jam okjara kultura revuo el Skandinavio, ankoraŭ urĝe bezonas pli da abonantoj por ekvilibrigi sian ekonomion. UEA peras abonojn.

### Instruistoj

● **Pliaj kunlaborantoj** en porinstruistaj lernejoj estas bezonataj por speciala rondo de "Grajnoj en Vento" (Jarlibro I p. 96). Skribu al Esperanto-Grupo, Učiteljišče, Resljeva č. 12, LJUBLJANA, Jugoslavio.

● **Por la Beograda Konferenco** (v. p. 17) tezojn preparas Vukomanović, Dimov, Thorsen, Lentaigne, Stefanović, Kennedy, Malmgren, Neergaard, Toczyski, Setälä, Ribot, Markarian, Williams, Smykalski, Albault, Sullivan, Dazzini, Djalinac, Erbetta, Dedieu, S. kaj P. Zlatnar.

### Komerco

● **Jam kvarafoje** aperis senpagaj Esperantaj afiŝoj pri la specimena foiro de Barcelona. Entreprenoj petu ekzemplerojn de la Propaganda Fako de la Foiro, Paseo de María Cristina s/n, Barcelona-4, Hispanujo.

### Medicino

● **Medicina Revuo,** kiu lastatempe ne aperis pro manko de mono kaj de kontribuaĵoj, plifortiĝis per milguldena donaco de D-ro Shinoda H. Estonte ĝi nomiĝos "Internacia Medicina Revuo".

### Skoltoj

● **Esperanto-ĵamboreeton** en 1964 projektas EŬROSEL, ĉe K. A. van Rossem, Pr. Hendrikweg 44, Putten (Gld.), Nederlando.

### UNESKO

● **La Ĝenerala Konferenco** de novembro-decembro 1962 diskutis i.a. "la racian evoluigon de lerneja eduko", kaj decidis starigi Internacian Instituton de Eduka Planado, en Parizo.

● **Konferenco en Tananarive** pri evoluigo de supera edukado en Afriko (septembro 1962) rekomendis: "studi la kondiĉojn kaj eblecojn de lingva komunikado inter ĉiuj Afrikaj landoj, por serĉi rimedojn por plivastigi kaj ĝeneraligi la uzadon de dua, kaj eble eĉ tria lingvo kiel medio de instruado" — kaj invitis kunlaboron ankaŭ de internaciaj neregistaraj organizaĵoj.

# LA JUNA VIVO

**Ĉion por la redakcio de "L. J. V." sendu al : Ivo Osibov, Sinjskih Žrtava 13/II SPLIT, Jugoslavio.**

# ORATORAJ KONKURSOJ

Oratoraj konkursoj estas konataj kaj ŝatataj esperantistaj aranĝoj. Ili edukas bonajn lingvouzantojn, ebligas al gejunuloj diri siajn opiniojn pri la plej diversaj problemoj kaj prezentas ĝuon por la aŭskultantoj.

En ĉi tiu jaro, kiu estas la Jaro de la Junularo en la Esperanto-Movado, laŭeble ne estu esperantista organizaĵo kaj precipe ne esperantista **junulara** organizaĵo, kiu ne okazigos oratoran konkurson. TEJO vidas en oratoraj konkursoj grandan valoron. Al tio, kion mi jam menciis, estas aldoninde, ke per oratoraj konkursoj eblas diskutigi la temojn, kiujn ni opinias diskutendaj en nuna tempo, kaj samtempe estas oratoraj konkursoj elekto de tiuj personoj, kiuj povas paroli al la junularo – kaj tiajn personojn ni en la Esperanto-Movado ege bezonas.

Internaciaj oratoraj konkursoj okazos dum la TEJO-kongreso en Vraca, Bulgarujo (27.VII - 3.VIII 1963) kaj dum la UK en Sofio, semajnon pli poste. Premioj estos kiel kutime, konsiderinde altaj monsumoj. La temojn por oratoraj konkursoj kompreneble starigas la organizanto. Mi nur sube aldonas kelkajn proponojn, por ke via elekto estu pli facila.

- Kiel arto povas kontribui al paco ?
- Kiel teknikoj helpas al kultura progreso ?
- Ĉu ekzistas opono inter arto kaj scienco ?
- Kiun arton vi preferas ? Kial ?
- Rolo de Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj
- Rolo de UNESCO
- Militoj, ĉu solvilo por internaciaj problemoj ?
- Kiel mi influas mian vivon ?
- Kia estu TEJO (LS, LA, JG) ?
- Ĉu estas Esperanto por mi vera funkcianta rimedo por internaciaj kontaktoj ?
- Korespondado – ligilo inter homoj
- Ĉu universitataj kleruloj bezonas Esperanton ?
- Kion fari por ne vane ellerni Esperanton ?
- Ĉu Esperanto estas hobio ?
- Kion mi ne ŝatas en Esperanto-Movado ?

**Svobodan Zlatnar**

---

## LA KONGRESA KOMITATO INFORMAS

Jam pluraj antaŭsignoj montras, ke la 19-a Kongreso de TEJO en Vraca estos unu el la plej amase vizititaj junularaj Esperanto-kongresoj ĝis nun. Cetere tio decas por 1963 – la Jaro de la Junularo.

Anoncis sin la unuaj 26 interesiĝantoj el Germana Demokrata Respubliko. La KK traktas kun la Estraro de PEJ pri la partopreno de 60 polaj gejunuloj. En la CO alvenis pluraj demandoj pri aligiloj. Sveda Esperantista Junulara Unuiĝo anoncis karavanon. La KK supozas, ke partoprenos pli ol 100 gejunuloj el okcidenta Eŭropo.

☆

Al pluraj naciaj kaj internaciaj organizaĵoj junularaj estis dissendita speciala franclingva informbulteno pri la kongreso kaj pri la Internacia Lingvo. La KK invitis ilin eventuale sendi observantojn, kiuj propraokule konstatu kiamaniere praktike funkcias la Internacia Lingvo. La KK danke akceptas adresojn de aliaj neesperantistaj junularaj organizaĵoj, al kiuj valoras sendi la informmaterialon.

La KK decidis aranĝi grandan loterion. Tiucele ĉiu kongresonto estas petata kunporti kaj donaci etan objekton, tipan por lia (ŝia) lando aŭ loĝloko. Bulgaraj gejunuloj ankaŭ preparos tipajn donacojn. Ĉiu objekto nepre devas porti klarajn indikojn pri la donacinto (minimume nomo kaj lando). La lotumado okazos publike, dum la Kongreso, ĉe konvena ceremonio. Donacoj ankaŭ de nekongresontoj estas danke akceptataj.

☆

La Kongreso en Vraca lasos siajn spurojn, ne nur en la memoro de la loĝantoj. La kongresanoj plantos en urba parko kverkon, memore al la Kongreso. La urbaj instancoj jam principe akceptis la proponon doni la nomon "Esperanto" al la parko kaj al la strato, kiu kondukas al ĝi.

☆

En Vraca okazos la unuaj veraj sportaj Konkursoj kaj oni nomos la unuajn Esperanto-mondĉampionojn pri la kurado, saltado kaj ĵetado. Komencu trejni vin jam nun por gajni la medalojn !

☆

La junuloj el urbo Ruse (Bulgarujo) anoncis kompletan futbalteamon. Kiu urbo, lando aŭ kontinento pretas vetludi kontraŭ ili ?

☆

Sekvante la ekzemplon de aliaj kongresoj, la Kongresa Komitato decidis premii ĉiun kvindekan aliĝinton per speciala donaco.

☆

La Bulgara Esperanto-Kinoklubo preparas la filmigon de la Kongreso en Vraca. La filmo devas respeguli en konvena formo la plej gravajn erojn de la Kongreso, samkiel la ĉiutagajn okupojn de la kongresanoj.

☆

La sportaj Konkursoj, al kiuj rajtas partopreni ĉiu aliĝinta kongresano, ampleksos precipe disciplinojn de malpeza atletiko, nome: por junuloj – kurado je 100 kaj 400 metroj, longa salto, alta salto kaj puŝo de pezaĵo; por junulinoj – kurado je 60 m, longa salto kaj alta salto.

☆

Tutcerte okazos turniro pri tablo-teniso kaj eventuale aliaj ludoj, se anoncos sin sufiĉe da kandidatoj.

☆

Pro pluraj kaŭzoj la Kongresa Komitato ŝanĝis sian unuan decidon kaj organizos la tuttagan ekskurson ĝis urbo Pleven. La urbo mem estas tre riĉa je historiaj vidindaĵoj, sed aparte alloga estas apudurba parko "Kajlâka", kun bela naturo kaj subĉielaj baneĵoj, en kiuj la kongresanoj povos pasigi agrablajn horojn. Krome, survoje kelkaj surprizoj estas atendeblaj.

# ESPERANTISTA VIVO KAJ NEKROLOGO

## JUBILEO

**Steiner.** Je 26.2.63 sian 85-an datrevenon festis la Direktoro de Internacia Esperanto - Muzeo Wien (fond. 1927). S-ro Steiner ankoraŭ tajpas persone la 3-an volumon (laŭalfabetan) de la muzea katalogo, volumo, kiu ampleksos ĉ. 600 paĝojn. Pasintjare li festis la oran jubileon de sia eklerno de Esperanto.

## NASKIĜO

**Svane.** Je 3.1.63 en Praha naskiĝis filo Erik John al S-ino Virginia Birkenmayer Svane kaj S-ro Eskil Svane, kunfondintoj de la UN-Esperanto-Klubo en New York.

## NEKROLOGO

**Noll.** Kordolore trafis nin la informo, ke F-ino Noll, Kopenhago, mortis hieraŭ, la 30-an de decembro. Ŝi efektive donis sian tutan vivon al la verko de Zamenhof. Pro ŝia partopreno en multaj kongresoj multaj gesamideanoj konas ŝin; sed plej konata ŝi estas pro siaj lecionoj kaj prelegoj en la feriaj Esperanto-kursoj en Helsingør kaj Vejle. Jam antaŭ 30 jaroj, kiam ni fondis la konatajn feriajn aranĝojn, ŝi helpis al mi. Sen ŝi, kaj sen F-ino Ida Christensen kaj S-ro Morariu ni ne havus tiom da sukceso. Mi estas certa pri tio, ke ĉiu, kiu aŭdis ŝian solan prelegon en la pasinta somero en Helsingør, neniam forgesos ĝin. Eble ŝi jam tiam sentis, ke ŝi faris sian lastan prelegon.

**L. Friis**

La entombiga ceremonio okazis en Kopenhago la 4-an de januaro en ĉeesto de sepdek personoj. La kopenhagaj Esperanto-organizaĵoj estis reprezentitaj pere de siaj prezidantoj, kaj UEA pere de komitatano S-ro O. C. Lange.

## ELKORAN DANKON !

Dum la lastaj monataj de la dua mondmilito malaperis sensigne mia bofratino S.S. el Estonio. Dum 17 jaroj mi kune kun mia edzino diversmaniere serĉis ŝin. Ni petis helpon de Ruĝa Kruco en Ĝenevo, turniĝis al Internacia Savarmeo, skribis al multaj homoj en diversaj landoj. Sed ni ricevis neniajn sciigojn pri nia perdiĝinta parenculino.

Laste, en la fino de la jaro 1961, mi decidis skribi al UEA-delegitoj en Britujo, Usono kaj Kanado petante ilian kunhelpon en serĉado de nia parenculino. Post kelkaj monatoj atingis nin ĝojiga sciigo de S-ro Frank J. Rogers, UEA-delegito en Ilford (Britujo), kiu skribis al ni, ke nia parenculino loĝas kaj laboras en unu provinca grandurbo de Britujo. Pasis ankoraŭ kelkaj semajnoj, kaj ni jam ricevis unuan leteron post 17 jaroj de nia retrovita parenculino persone, kiu loĝas en Southampton. Neniaj vortoj povis esprimi nian grandegan ĝojon, precipe mia edzino ne sciis, kion fari, ĉu plori, ĉu ridi pro la granda feliĉo. Ni estis profunde kortuŝitaj, ke nome per Esperanto kaj per UEA-delegitoj ni povis retrovi nian parenculinon.

Mi kune kun mia edzino dankas kore ĉiujn UEA-delegitojn, kiuj varmkore kaj amike kontribuis en la serĉado, pro ilia simpatio kaj sincera amikeco. Sed nia precipe tutkora kaj sincera danko apartenas al S-ro Frank J. Rogers. Ni deziras al ili ĉiuj plenajn sukcesojn en persona vivo kaj poresperanta laboro.

**Lembit Tangsoo, Estonio.**

# ŜAKA RUBRIKO

**Gvidas D-ro V. Faigl, Zlonice, Ĉeĥoslovakio**

**Problemo n-ro 26** (Konkurso 1963 — n-ro 2)

E. Visserman (Nederlando) — el Čs. šach n-ro 10/62

Mato en 2 movoj. Pro ĝusta solvo 2 poentoj.

Kontrolo: Blanko: Rh1, Dh5, Ta4, Tg2, Kc1, Kh7, Ĉd2, Ĉe3 p.: d5, e5, f2

Nigro: Rf4, Dd4, Tf8. Ka1. Ĉf1, Ĉg1, p.: c7, e2, g3

Solvojn sendu ĝis 30.6.63 al gvidanto de la rubriko.




# *Ni Citas*

**R.B.O.'Brien** en angla ĵurnalo "Daily Telegraph": "La fundamenta celo de la (Edinburga) Festivalo estas internacia kompreno kaj amikeco per la artoj. Kiom da kompreno oni fakte atingis? . . . Por la plimulto la rusoj estis ĝenerale same malproksimaj, kiel se ili estus en Moskvo . . . Kompreneble, granda baro kontraŭ kompreno estas la lingvo: tion volonte konfesis al mi, per sia tradukisto, Stefanov (estro de la Ekster-rilata Fako de la Soveta Ministerio de Kulturo), esprimante sian bedaŭron, ke li ne kapablas paroli angle. Tion mi tre praktike sentis post kelkaj minutoj. Mi ĵus mendis trinkaĵojn. Ĝuste kiam ili alvenis, iu forvokis la interpretiston. Stefanov ŝultrolevis, kaj ni kune trinkis en silento."

**El librokatalogo:** ". . .sed 1943 japanaj armeoj invadis la insulon . . ." *Por negoci el supera pozicio, sendube.*

# RADIO

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

Por tempoj kaj ondlongoj vidu la januaran numeron.

Mallongigoj: I = Informoj, P = Parolado, K = Kurso.

**Radio Roma.** 1-III, Italujo kaj fremdaj komponistoj: Mozart; 5-III, Tra la literaturo; 8-III, Religiaj ordenoj: "Bonfaru, fratoj"; 12-III, Novaĵoj el Italujo; 15-III, La morto de Cezaro kaj la "Filipikoj" de Cicerono; 19-III, Italaj kanzonoj en Esperanto; 22-III, Italaj belartaj urboj: Verona; 26-III, Leterkesto; 29-III, La pliamo de Jesuo al la blinduloj. Krome, ĉiun merkredon: Kuriero de Esperanto.

**Pola Radio** en Varsovio prezentas ĉiutage duonhoran programon. Lunde, felietono pri politika, socia, ekonomia, kultura, scienca, aŭ priesperanta temo; marde, kultura kroniko, vortmuzika elsendo, kaj la unuan mardon de ĉiu monato: Anguleto por blindaj esperantistoj; merkrede, felietono "pri kio oni parolas en Pollando" kaj koncerto kun bondeziroj; ĵaŭde, komentario pri aktualaj temoj kaj leterkesto; vendrede, literatura rubriko; sabate, la semajno en Pollando; dimanĉe, panoramo de la internaciaj eventoj kaj esperantista magazino. Krome, ĉiutage, novaĵoj el Pollando kaj el la mondo.

**Radio Praha** denove elsendas en Esperanto ĉiun lastan ĵaŭdon de la monato dum la programo de la fremdlingva disaŭdigo por Aŭstrujo de 17.15 ĝis 18.00 per ondoj 233 m. (1286 kcs.) kaj ĉiun sekvantan vendredon de 10.00 ĝis 11.10 per mallongaj ondoj 31 m., 41 m., 49 m.

# TESTAMENTI

Multaj homoj malemas pensi pri sia testamento. Kial? Mi supozas, ke estas pro tio, ke testamento rilatas al la morto kaj oni ne volas pensi pri la morto. Aliaj homoj ne timas pensi pri la morto, tamen ili ĉiam prokrastas la faron de testamento, kvazaŭ ili per tio povus prokrasti la morton.

Se estus eble prokrasti la morton, ne pensante pri ĝi kaj/aŭ ne farante testamenton, estus mia devo konsili al vi ĉiuj agi tiel. Sed ĉu ne povas esti, ke la vero estas pli proksima al la kontraŭo? Do, ke post faro de la testamento laŭ la propra deziro oni vivas pli longe? Fakto ja estas, ke ripozo, ne nur korpa sed precipe psiĥa ripozo, estas tre bona por la sanstato. Se iu kiu sentas en si la bezonon fari decidon pri siaj posedaĵoj, ne faras la necesan testamenton, tiam li ĉiam restas iom maltrankvila pro la ne farita laboro. Tio ne estas bona por lia sano. Post pretigo de la testamento, li sentas ke li faris tion, kion li deziris fari. Li sentas sin pli kvieta kaj pro tio li vivas pli trankvile, eble ankaŭ pli longe?

Kial mi skribas la suprajn frazojn en nia revuo?

Nu, kvankam mi tion ne povas pruvi, mia opinio estas, ke multe pli da Esperantistoj dezirus ke U.E.A. ricevu parton de la postlasitaj havaĵoj, ol U.E.A. ĝis nun vere ricevis. Mia supozo estas, ke multaj fidelaj samideanoj, kiuj dum sia vivo multe laboris por kaj ĝuis pro la organizita movado, deziris ion postlasi por U.E.A., sed ke fine tio ne okazis nur pro la fakto ke ili ĉiam prokrastis la pretigon de testamento pri tio, tiel ke fine estis tro malfrue.

Ke mi per tiu ĉi artikolo instigas al ĉiu, kiu deziras ke Universala Esperanto-Asocio ricevu ion el la postlasitaj havaĵoj, ne prokrasti la pretigon de testamento, tio havas ankoraŭ specialan kialon. Okazis en la pasintaj monatoj ke kelkaj samideanoj, konfidence, parolis aŭ korespondis kun mi pri sia testamento kaj petis konsilojn. Mi ilin kompreneble volonte donis.

Estis demando: kiel fari testamenton? Ne estas eble doni en artikolo ĉiujn informojn pri tio. La leĝoj de la landoj tiurilate estas tre diversaj. En multaj landoj ekzistas notarioj, plej ofte ili estas la homoj kiuj kutime pretigas la testamentojn. Sed en kelkaj aliaj landoj oni eĉ ne havas notariojn. Ekzemple, en Nederlando oni devas por fari validan testamenton iri al notario, en Germanujo oni povas uzi la helpon de notario, sed oni ankaŭ propramane povas pretigi testamenton, kiun oni devas tiam transdoni al tribunalo. En Svislando oni eĉ povas mem konservi la testamenton. (Tio povas laŭ mi kaŭzi gravan danĝeron, se post la morto neniu oficiala instanco scias pri la ekzisto de la testamento). En Nederlando ekzistas centra registro de ĉiuj testamentoj; de tiu registro oni povas havi ĉiujn informojn pri la testamento(j), sed kompreneble nur post la morto de la koncerna homo.

Tiu, kiu faras (aŭ faris) testamenton favore al U.E.A., certe ne bezonas ion komuniki pri tio al la C.O., la ĝenerala sekretario aŭ al mi, sed se oni tion faras, ĉiu komuniko restas konfidence gardita.

Se iu deziras — konfidence — korespondi pri pretigo de testamento favore al U.E.A., mi kompreneble ĉiam estas preta doni ĉiujn deziratajn konsilojn.

Fine mi atentigas ke Universala Esperanto-Asocio kun sidejo en Rotterdam havas Nederlandan juran personecon kaj ke do estas eble el ĉiu lando de la mondo testamenti al U.E.A., same kiel tio validas favore al fizika Nederlandano.

**E. J. Woessink,**
estrarano pri financoj

---

## LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1963

Stato je la 31-a de januaro

Konkurso I

| | Lando | Kvoto | Poentoj | % |
|---|---|---|---|---|
| 1. | Finnlando | 2570 | 2500 | 97.28 |
| 2. | Svislando | 2141 | 1595 | 74.50 |
| 3. | Nederlando | 5068 | 3130 | 61.76 |
| 4. | Danlando | 2936 | 1640 | 55.86 |
| 5. | Francujo | 7225 | 3973 | 54.99 |
| 6. | Svedujo | 6640 | 3410 | 51.36 |
| 7. | Belgujo | 1695 | 820 | 48.38 |
| 8. | Japanujo | 3240 | 1545 | 47.69 |
| 9. | Britujo | 6368 | 2932 | 46.04 |
| 10. | Usono | 4110 | 1890 | 45.99 |
| 11. | Germanujo | 7221 | 3145 | 43.55 |
| 12. | Brazilo | 3856 | 1638 | 42.48 |
| 13. | Norvegujo | 1755 | 705 | 40.02 |
| 14. | Hispanujo | 2696 | 1020 | 37.83 |
| 15. | Italujo | 4220 | 1115 | 26.42 |
| 16. | Jugoslavio | 5180 | 890 | 17.18 |

Konkurso II

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| 1. | Kanado | 769 | 470 | 61.12 |
| 2. | Aŭstralio | 1233 | 650 | 52.72 |
| 3. | Portugalujo | 515 | 245 | 47.57 |
| 4. | Aŭstrujo | 1475 | 670 | 45.42 |
| 5. | Madagaskaro | 250 | 100 | 40.— |
| 6. | Israelo | 300 | 80 | 26.67 |
| 7. | Urugvajo | 250 | 45 | 18.— |
| 8. | Islando | 250 | 35 | 14.— |
| 9. | Nov-Zelando | 1167 | 105 | 9.— |
| 10. | Sudafriko | 250 | 10 | 4.— |
| 11. | Argentino | 905 | 30 | 3.31 |

Vidu la regulojn sur paĝo 26 (Febr. 1963).

# STATISTIKO PRI LA MEMBRARO 1962

| Lando | AM | MJ | MA | MS | PAT. | DM | HM | J-MJ | J-MA | SUMO |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| Acoroj | — | — | 1 | — | — | — | — | — | — | 1 |
| Alĝerio | — | 4 | 3 | — | — | 1 | — | — | — | 8 |
| Antiloj | — | — | 1 | — | — | — | — | — | — | 1 |
| Argentino | 460 | — | 43 | 1 | — | 12 | — | — | — | 516 |
| Aŭstralio | 133 | 7 | 92 | 7 | — | 19 | — | — | 4 | 262 |
| Aŭstrujo | 400 | 21 | 89 | 2 | — | 4 | 3 | — | — | 519 |
| Belgujo | 255 | 15 | 132 | 8 | — | 6 | 1 | — | 2 | 419 |
| Bermudoj | — | — | 1 | — | — | — | — | — | — | 1 |
| Bolivio | — | — | 1 | — | — | — | — | — | — | 1 |
| Brazilo | 731 | 50 | 200 | 46 | 1 | 34 | 1 | 3 | 2 | 1068 |
| Britujo | 768 | 67 | 402 | 59 | — | 64 | 3 | 3 | 31 | 1397 |
| Bulgarujo | 4050 | 18 | 174 | 1 | — | 3 | — | — | 2 | 4248 |
| Cejlono | — | — | 2 | — | — | 2 | — | — | — | 4 |
| Cipro | — | — | 1 | — | — | — | — | — | — | 1 |
| Ĉeĥoslovakujo | — | 3 | 92 | — | — | 3 | 3 | — | — | 101 |
| Ĉinujo | — | 1 | 4 | — | — | — | — | — | — | 5 |
| Danlando | 826 | 17 | 162 | 21 | — | 6 | 1 | — | 4 | 1037 |
| Egiptujo | — | — | 1 | — | — | 2 | — | — | — | 3 |
| Filipinoj | — | — | 1 | — | — | — | — | — | — | 1 |
| Finnlando | — | 67 | 194 | 8 | — | 3 | 1 | 16 | 6 | 295 |
| Francujo | 1665 | 70 | 453 | 25 | — | 36 | 8 | 6 | 19 | 2282 |
| Gabono | — | — | 1 | — | — | — | — | — | — | 1 |
| Germanujo | 1876 | 66 | 420 | 42 | — | 25 | 1 | 2 | 9 | 2441 |
| Grekujo | — | 1 | 11 | — | — | — | 1 | — | — | 13 |
| Gvatemalo | — | — | 5 | — | — | — | — | — | — | 5 |
| Havajo | — | — | 3 | — | — | — | — | — | — | 3 |
| Hindujo | — | — | 18 | — | — | — | — | — | — | 18 |
| Hispanujo | 436 | 22 | 196 | 8 | — | 6 | — | — | 2 | 670 |
| Hongkongo | — | — | — | — | — | 1 | — | — | — | 1 |
| Hungarujo | 1500 | 1 | 29 | 1 | — | — | 3 | — | 3 | 1537 |
| Indonezio | — | — | 1 | — | — | — | — | — | — | 1 |
| Irano | — | — | — | — | — | 2 | — | — | — | 2 |
| Irlando | — | 1 | 6 | — | — | 1 | — | — | — | 8 |
| Islando | — | — | 20 | 1 | — | 3 | — | — | — | 24 |
| Israelo | — | — | 30 | — | — | 4 | — | — | — | 34 |
| Italujo | 1100 | 16 | 275 | 16 | — | 4 | 1 | 2 | 7 | 1421 |
| Japanujo | 1200 | 8 | 185 | 1 | — | — | 1 | 1 | 13 | 1409 |
| Jugoslavio | 3500 | 27 | 140 | 5 | — | 14 | — | — | 9 | 3695 |
| Kameruno | — | — | 1 | — | — | — | — | — | — | 1 |
| Kanado | 84 | 6 | 50 | 9 | — | 3 | — | — | 2 | 154 |
| Katario (Katario) | — | — | — | — | — | 1 | — | — | — | 1 |
| Kenjo | — | — | 1 | — | — | 1 | — | — | — | 2 |
| Kolombio | — | — | 1 | — | — | — | — | — | 1 | 2 |
| Kongio (eks-franca) | — | — | — | 1 | — | — | — | — | — | 1 |
| Kongolando | — | — | 1 | — | — | — | — | — | — | 1 |
| Koreo Suda | — | — | 1 | — | — | — | — | 1 | — | 2 |
| Kostariko | — | — | — | 1 | — | 1 | — | — | — | 2 |
| Kubo | — | — | — | — | — | 1 | — | — | — | 1 |
| Libano | — | — | 1 | — | — | — | — | — | 3 | 4 |
| Liĥtenstejno | — | — | 1 | — | — | — | — | — | — | 1 |
| Luksemburgo | — | — | 1 | — | — | — | — | — | — | 1 |
| Madagaskaro | 31 | 1 | 9 | 4 | — | — | — | 1 | 5 | 51 |
| Makao | — | — | 1 | — | — | — | — | — | — | 1 |
| Malto | — | — | 1 | — | — | — | — | — | — | 1 |
| Maroko | — | — | 4 | 4 | — | 3 | 1 | — | — | 12 |
| Meksiko | — | 1 | 23 | — | — | 2 | — | — | — | 26 |
| Monako | 40 | 1 | 5 | — | — | — | — | — | — | 46 |
| Mozambiko | — | — | 4 | — | — | — | — | — | — | 4 |
| Nederlando | 658 | 66 | 353 | 23 | — | 35 | 4 | 1 | 5 | 1145 |
| Nepalo | — | — | 3 | — | — | — | — | — | 2 | 5 |
| Nigerio | — | — | 1 | — | — | — | — | — | — | 1 |
| Norvegujo | 505 | 7 | 101 | 11 | — | 7 | 1 | — | 4 | 636 |
| Nova Gvineo | — | — | 1 | — | — | — | — | — | — | 1 |
| Nov-Zelando | 292 | 28 | 63 | 6 | — | 13 | — | 3 | — | 405 |
| Pakistano | — | — | 1 | — | — | — | — | — | — | 1 |
| Polinezio | — | — | 1 | — | — | — | — | — | — | 1 |
| Pollando | 3100 | 7 | 250 | — | — | 1 | — | — | 1 | 3359 |
| Portoriko | — | — | 2 | — | — | — | — | — | — | 2 |
| Portugalujo | — | 1 | 42 | 6 | — | 4 | 2 | — | — | 55 |
| Rumanujo | — | 1 | 3 | — | — | — | — | — | — | 4 |

| Lando | AM | MJ | MA | MS | PAT. | DM | HM | J-MJ | J-MA | SUMO |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| Salomon-ins. | — | — | 1 | — | — | — | — | — | — | 1 |
| Samoa-ins. | — | — | — | 1 | — | — | — | — | — | 1 |
| Senegalio | — | — | 2 | — | — | — | — | — | — | 2 |
| Singapuro | — | — | 1 | — | — | — | — | — | — | 1 |
| Sovetunio | — | 5 | 80 | 1 | — | 2 | — | — | 1 | 89 |
| Sudafriko | — | 3 | 15 | 2 | — | 5 | — | — | — | 25 |
| Svedujo | 1200 | 123 | 340 | 86 | — | 28 | — | 1 | 8 | 1786 |
| Svislando | 131 | 77 | 129 | 11 | — | 39 | 2 | — | 2 | 391 |
| Tajlando | — | — | — | — | — | 1 | — | — | — | 1 |
| Trinidado | — | — | 1 | — | — | — | — | — | — | 1 |
| Tunizio | — | 1 | — | — | — | — | — | — | — | 1 |
| Turkujo | — | — | 3 | — | — | — | — | — | — | 3 |
| Urugvajo | 50 | 1 | 10 | — | — | 1 | 1 | — | — | 63 |
| Usono | 300 | 37 | 254 | 45 | — | 32 | 1 | 8 | 18 | 695 |
| Venezuelo | — | — | 18 | — | — | — | — | — | — | 18 |
| 85 landoj | 25291 | 848 | 5169 | 463 | — | 135 | 40 | 48 | 165 | 32460 |

## Memoriga Kalendaro

**Marto**

9-10 Svisa Kongreso en Bern
30-31 FLE-Kongreso en Antverpeno
31 UK-Kotizoj plialtiĝos

**Aprilo**

1 lasta dato por respondi al CED-enketo (1962 p. 208)
1-7 Paska Kultura Semajno en Grésillon.
12-15 E-ista renkontiĝo, Morwell, Aŭstralio
13-16 Kongreso SAT-Amikaro, Rouen
Pasko Argentina Kongreso, Venado Tuerto
14-15 2-a Markola Kongreso, Dovro

**Majo**

10-13 Germana Kongreso, Würzburg
11-17 15-a IFEF-Kongreso en Stoke-on-Trent
31 Limdato por Belartaj Konkursoj
31-3/6 Brita Kongreso, Hastings

**Pentekosto**

Dana Kongreso, Kolding
Franca Kongreso, Perpignan
Norvega Kongreso, Stavanger
Sveda Kongreso, Lund

**Junio**

30—15/9 Kursoj, ferioj ĉe Grésillon

**Julio**

1— 3 Beneluksa Kongreso, Antverpeno
1—20 Feria Kurso por Esperanto-instruistoj, Gdańsk
5— 7 Usona Kongreso, Pittsburgh
6—10 Hungara Somera Universitato, Gyula
15—28 Somera Tendaro, Lanĉov, Ĉeĥoslovakio
20—26 SAT-Kongreso, Hamburg
21—25 Pola Kongreso kaj Seminario "Oriento-Okcidento", Szczecin
25—28 Hispana Kongreso, Barcelona
25— 1/8 KELI-Kongreso, Graz

# UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

**NIEUWE BINNEWEG 176 ROTTERDAM-2 NEDERLANDO**

OFICIALA INFORMILO — La 1-an de Februaro 1963

N-ro 355

### DELEGITOJ

#### Belgujo

**Ciney** (Namur) D: vakas.

#### Britujo

**Brockenhurst** (Hampshire)
JD: vakas.

**Slough** (Bucks) 90.000
D: S-ino Maude Collins, dommastrino, 43 Sussex Place.

#### Bulgarujo

**Sofia** D: vakas.

#### Finnlando

**Hartola** (Mikkelin lääni) 6.400
D: S-ro Kide Näätänen, popollerneja instruisto, Heinola, Salajärvi.
FD (Instruado): la D.

**Helsinki**-Malmi (Uudenmann lääni)
VD: vakas.

**Helsinki**-Munkkiniemi (Uudenmaan lääni)
VD: S-ro Jarkko Laine, sekciestro, Laajalahdentie 28 B 14.

**Helsinki**-Tapanila (Uudenmaan lääni)
VD: S-ro T. Ilmari Haapalainen, pastoro (luter), Veljestentie 6.

**Helsinki**-Munkkiniemi (Uudenmaan lääni)
FD (Librokomerco): S-ro Jarkko Laine, sekciestro, Laajalahdentie 28 B 14.

**Helsinki**-Malmi (Uudenmann lääni)
FD (Muziko baroka): vakas.

**Kuopio** (Kuopion lääni) 46.000
VD: S-ro Matti Ruotsalainen, lingvo-instruisto, Puusepänkatu 11.

**Maaria** (Turun ja Porin lääni) 2.300
D: S-ro Toivo Ojanen, terkulturisto, Paimala.

**Tampere** (Hämeen lääni)
FD (Ornitologio): S-ro Pekka Lehtinen, komercisto, Ojakatu 1.

#### Francujo

**Aubenas** (Ardéche) 10.000
FD (Asekuro): S-ro Jean Rouviére. inspektoro pri socia-asekuro, 25 Allées de la guinguette "Vista Bela".

**Codognan** (Gard) 742
FD (Tendumado): S-ro René Lavallée, arablingva interpretisto.

**Fresnoy-le-Grand** (Aisne) 3.000
FD (Instruado): S-ro Edmond Bidoit, lernejestro, C.E.G.

**Roanne** (Loire)
D: vakas.
FD (Medicino): vakas.

#### Germanujo

**Bretten** (Baden) 10.000
FD (Muziko-violono): S-ro Emanuel Sebera, emerita fervojoficisto, Unterm Rechberg 7.
FD (Parapsikologio): la FD pri Muziko.

**Dortmund** (Westfalen) 640.000
FD (Liberpensado): S-ro Eduard Weichmann, pesisto. 46 Dortmund-Kirchderne, Lotenkamp 4.

**Edenkoben** (Rheinland-Pfalz) 7.000
D: S-ro Anton Kiefer, vinberkulturisto, Bahnhofstrasse 154.
FD (Vinkulturo): la D.

**Rüsselsheim** (Hessen) 43.500
D: S-ro Alfred Schmidt, vicurbestro, An den Weiden 102.

**Westerland** (Sylt) 9.000
D: S-ro Günter Lehnert, ladisto, Stadumstrasse 27.

**Walsrode** (Niedersachsen) 13.000
FD (maŝinskribado): S-ro Hermann Behrmann, instruisto, Memelstrasse 14.
FD (Stenografio): la FD pri maŝinskribado.

**Hispanujo**

**Vich** (Barcelona)
D: vakas.

**Israelo**

**Hadera** 50.000
FD (Ĵurnalismo): S-ro Oskar Berman, oficisto, 49, Tarna Strato.

**Italujo**

**Bologna** 400.000
FD (Borsaj aferoj): S-ro Luigi Tadolini, bank-agento (borsa fako), Via Porrettana No. 137.
FD (Farmacio): la FD pri borsaj aferoj.

**Roma** (Lazio) 2.200.000
JD: S-ro Antonio de Salvo, fervoja oficisto/studento pri juro, Via Ezio 29.
FD (Impostoj): S-ro Giancarlo Guarnieri, bankoficisto, Via della Badia di Cava 62.

**Trento**
D: S-ro Gustavo Perini, pensiulo, Via Taramelli 2/2
FD (Terkulturo): la D.

**Jugoslavio**

**Split** (Dalmaĉija Hrvatska) 85.000
FD (Kolorigado): S-ro Davor Grgat, kolorigisto, Dvorikova 2-a.

**Kanado**

**Montreal** (Quebec) 1.800.000
D: S-ro Jean Forgeau, kontoristo, 5872- 1 a Avenue Apt. 2, Rosemont.

**Nederlando**

**Den Haag** (Zuidholland)
FD (instruado): S-ro Eddy Borsboom, instruisto de Cheynstraat 52-54.

**Ede** (Gelderland) VD: vakas.

**Leeuwarden** (Friesland)
FD (PTT): S-ro Wieger de Vries, poŝt-oficisto, van Cronenburchstraat 25.

**Utrecht** (Utrecht)
FD (Filmarto): S-ro Hendrik Martinus Schippers, instruisto, van Humboldtstraat 60
FD (Instruado): la FD pri Filmarto.

**Pollando**

**Cieszyn** (Silezio) 20.000
FD (Literaturo): Mag. Kâzimejaĵ Ŝĉurek, pedagogo, str. Przepilińskiego 28.

**Gdańsk** JD: vakas.

**Gliwice** 150.000
VD: S-ro Antoni Golonka Angopojo, bibliotekisto, lektoro de E, poŝtkesto 321.

**Poznań** 420.000
FD (Agronomio): S-ino Teresa Skrzypczak, inĝenierino de agronomio, str. Walki Młodych 19/7.

**Zabrze** (Supra Silezio) 196.000
D: S-ino Danuta Pisiewicz, administracia laboranto, Sienkiewicza 3/3.

**Portugalujo**

**St. João da Madeira**
(Beira Litoral) 10.000
D: D-ro Adácio Araŭjo, profesoro, St. Júlio Dinis.

**Sovet-Unio**

**Omsk** (Siberio) 600.000
VD: F-ino Ljudmila Kolmakova, instruistino de matematiko, Boljniĉnaja 19.
JD: la VD.
FD (Poezio): la VD.

**Riidaja** (Eesti) 1.590
D: S-ro Evald Piirimees, pensiulo.

**Tôrva** (Estonio) 2.000
FD (Turismo): S-ro Lembit Tangsoo, libroteniisto, Männiku 14.

**Svedujo**

**Karlskoga** (Värmlando)
FD (Metiinstruado, labormerkata leĝaro): S-ro Olof Ragnar Lindahl, metiinstruisto, Hopslagarevägen 54.

**Lund** (Skåne) 40.000
JD: S-ro Franko Luin, studento, Dag Hammarskjölde väg 2.

**Nässjö** (Småland) 19.000
FD (Komerco): S-ro Martin Fejde, komerca vojaĝisto pensiita, Sjögärdsgatan 60.

**Övertorneå** (Norrbotten) 2.000
D: S-ro Gunnar Svensson, metiinstruisto, Box 950.
FD (Filatelo): la D.

**Trelleborg** (Skåne) 20.000
D: F-ino Elisabet Nilsson, instruistino, Clementsgatan 17.
FD (Instruado): la D.

**Svislando**

**Bellinzona** (Tiĉino) 14.000
JD: S-ro Tazio Carlevaro, lernanto, Viale Stazione 23.

**Locarno** (Ticino) 10.150
FD: (Religio: Bahaismo): S-ino Etty Graeffe, instruistino, Casa Alfa, Via Rinaldo Simen, c/o Vagneux.

**Neuchatel** FD (Edukado): vakas.

**Urugvajo**

**Montevideo** (Montevideo) 900.000
VD: S-ro Alfredo Klein, komercisto, Rambla Rep. de Chile 1647, apt. 1004.
FD (Esperantologio): S-ro Ernesto Sonnenfeld, komercisto, Rambla Rep. de Chile 1647, apt. 910.

**Usono**

**Bowmansville** (New York) 500
D: S-ro Edward Lindberg, fizikisto, 113 Maple Avenue.
FD (Optiko astronomia): la D.

**Chicago** (Illinois) 1.000.000
FD (Magio): S-ro Harold S. Schroeppel, kemio, 17354 Mahoney PKwy, Hazel Crest.

**Fayetteville** (Arkansas) 23.000
D: S-ino Dorothy Holland, domestrino, 1976 Greenview Drive.
FD (Instruado de kemio kaj fiziko): S-ro Roy Holland, instruisto, 1976 Greenview Drive.

**Hazel Crest** (Illinois) 5.000
D: S-ro Harold S. Schroeppel, kemio, 17354 Mahoney Pkwy.

**Mattoon** (Illinois) 25.000
FD (Bahaa Religio): S-ino Sara E. Harris, instruistino Bahaa Religio, 63 Wabash Ave.

**Maywood** (California) 16.000
D: S-ino Corinne Roomes, dommakleristino, 6133 Pine Ave.

**Monroeville** (Penn) 25.000
D: S-ro Jack McCartay, esplora elektrokemiisto, 4421 Driftman Drive.
FD (Galvanizado): la D.

**Newark** (New Jersey) 500.000
FD (Telefona industrio): S-ro Don Hoffman, statistikisto kontrolisto, 1444 Leslie St., Hillside.

**Saint Louis** (Missouri) 750.000
D: S-ro John Sabin, raportisto, 9 Princeton Place, University City.

## NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Brownlee, S-ro J., Hexham, Britujo.

Furon, S-ro F., Angers, Francujo.

Zaleski-Zamenhof, Inĝ. Ludoviko, Warszawa, Pollando

Persson, S-ro Anders, Höganäs, Svedujo.

Schneebeli, S-ro Rud, Zürich Svislando.

Zuber, S-ro E. H., Konolfingen, Svislando.

Porter, F-ino M., Los Angeles, Usono.

## MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1963

128. Taylor, S-ro Frank V., Melbourne, Aŭstralio; 129. Boatman, S-ro Douglas P., Westcliff-on Sea, 130. Cross, S-ino D., Leicester, 131. Eldon, S-ro H. B., Southport, 132. Fraser, F-ino R. G. M. Ilford, 133. Hanson, S-ro C. G., Teighmouth, 134. Ingham, S-ro H., Liverpool, 135. Mallet, F-ino E. E., Edgware, 136. Middlemast, S-ro Arthur R., Bournemouth, 137. Relf, S-ro E. F., Addlestone, 138. Saunders, S-ino A. J., Ventnor, 139. Seddon, S-ino R., Southport, 140. Sinclair, F-ino Patricia C., Methil, 141. Westmancote, S-ro W. F., Bristol, 142. Williams, S-ro Norman, Manchester, ĉiuj en Britujo; 143. Jahn, S-ro C. J., København, Danlando; 144. Ihander, F-ino Olga Maria, Pietarsaari, 145. Mikkola, S-ro Jalmari, Oulunkylä, 146. Narvala, S-ro Nils Gosta, Käpylä, 147. Teukku, S-ro T., Vammala, 148. Vilkki, S-ro Joel, Somero, 149. Vuolo, S-ro Lauri, Suomusjärvi, 150. Vuori, S-ro A., Särkisalo, ĉiuj en Finnlando; 151. Beau, S-ro Jean, Marseille, 152. Pera, S-ro Jean, Grenoble, 153. Trésorier, S-ino Jacqueline, Besançon, 154. Yelland, S-ro E. E., Aspremont, ĉiuj en Francujo; 155. Bettges, S-ro Johann, Duisburg-Meiderich, 156. Böcker, S-ro Heinrich, Gelsenkirchen, 157. David, D-ro Ed., Nürnberg, 158. Epstein, S-ro Felix, Hamburg, 159. Fritsch, D-ro Erdmann, Langelsheim, 160. Gründler, S-ro Marin, Bad Homburg V. D. Höhe, 161. Grundhoff, S-ro Josef, Wuppertal, 162. Jolliet, S-ro Leo, Wiesbaden, 163. Kind, S-ro Ernst, Stotz-

heim, 164. Knause, S-ro Wilhelm, Neu-Ulm, 165. Kraft, S-ro Theodor, Schäbisch Gmünd, 166. Michling, S-ro Inĝ, Horst, Göttingen, 167. Schiermann, S-ro Karl, Burgstemmen über Elze, 168. Urban, S-ro Walter, Burtenbach, 169. Volk, S-ro Friedrich, Würzberg, ĉiuj en Germanujo; 170. Mercantil, S-ro Prezidanto Circulo, Málaga, 171. Criach, S-ro Antonio, Sabadell, 172. Pastor-Zarraonandia, S-ro A., Bilbao, ĉiuj en Hispanujo; 173. Blöndal, S-ro Björn P., Hvammstanga, Islando; 174. Boscarino, S-ro Giusseppe, Ragusa, Italujo; 175. Archell, S-ro Reginald, Ville Lasalle, 176. Maier-Bevel, S-ino Alice L., Galiano Island, ambaŭ Kanado; 177. Koekma, S-ro A., Den Haag, 178. Mabesoone, S-ro P. M., Amsterdam, 179. Mast, S-ro J. L., Amsterdam, 180. Ravestein-Basters, S-ino J. M.., Den Haag, 181. Roelofsen, S-ro Inĝ. S., Hollandse Rading, 182. Woessink, S-ro E. J., Arnhem, ĉiuj en Nederlando; 183. Fygle, S-ro Björn, Bodø, 184. Maarli, S-ro E., Bodø, 185. Ringstad, S-ro G., Torp, 186. Støp-Bowitz, S-ro C., Oslo, 187. Thorvaldsen, S-ino E., Asker, ĉiuj en Norvegujo; 188. Linnander, S-ro S., Stockholm, Svedujo; 189. Barkley, F-ino Margaret L., Palo Alto, 190. Barta, S-ro R., Denver, 191. Beard, S-ro Ralph, H., Staten Island, 192. Becquet, S-ro C. A., New York, 193. Belinfante, D-ro F. J., West Lafayette, 194. Colt, Sgt. Barbara, San Francisco, 195. D'Estries, S-ino Madeleine, Bay Shore, 196. Doneis, S-ro A. F., Pharr,, 197. Eisele, S-ro J., St. Louis, 198. Falgier, S-ro George, St. Louis, 199. Franke, S-ro Wm. J., Rensselaer, 200. Lieberman, D-ro E. James, Brookline, 201. Milsted S-ro H. B., Zanesville, 202. Regal, S-ro Arthur, Downers Grove, 203. Regal, F-ino Julie L., Downers Grove, 204. Rushing, D-ro John B., Houston, 205. Schackmann, S-ro J. H., Cincinatti, 206. Schroeppel, S-ro H. S., Hazel Crest, 207. Schulze, S-ino Cath. L., Hillsborough, 208. Scott, S-ro Ronald, Greensboro, 209. Simon, S-ro Werner, Memphis, 210. Solzbacher, D-ro William, Washington, 211. Walker, S-ro Dean, Napa, 212. Walker, S-ino Martha, Napa, ĉiuj en Usono.

### DONACO AL INTERNACIA ARTA TEATRO

S-ro U. Paul Ronald, Roxboro, Kanado 10,05 gld.

### FONDAJO ZAMENHOF

Antaŭa sumo 18.757,57 gld.

S-ro Martin Gründler, Bad Homburg, Germanujo 10,— gld.; S-ro Vicente Marin, Barcelona, Hispanujo 12,50 gld.

Entute 18.790,07 gld.

Daŭrigu vian kontribuadon por subteni la plian agadon de la Asocio, por firmigi la poziciojn akiritajn dum la Zamenhof-Jaro !

### FONDAJO DOMO

S-ro Beau, Marseille, 7,50 gld., S-ro F. Charlet, Mézières, 62,— gld., S-ino Marin, Bagnolet, 15,— gld., S-ro Pottier, Blangy, 7,50 gld., S-ino J. Ressort, Marseille, 3,75 gld., S-ro H. Reymond, Marseille, 3,75 gld., S-ro Rival, St. Etienne, 8,75 gld., S-ro Tuffier, Boulogne, 7,50 gld., ĉiuj en Francujo; S-ro A. Criach, Sabadell, 8.75 gld., S-ro J. Lopez, El Ferrol, 1,25 gld., S-ro S. Oliva, La Coruna, 1,25 gld., ĉiuj en Hispanujo; S-ro U. Paul Ronald, Roxboro, Kanado; D-ro A. Vieira Arauja, S. Joao de Madeira, 32,50 gld., F-ino M. E. Vieira Caetano, Ponda do Sol, 47,62 gld., S-ro de Freitas, Porto, 6,25 gld., ĉiuj en Portugalujo; Inĝ. K. J. Moberg, Bromma, 69,45 gld., Svedujo.

Ĉiuj donacintoj de minimume 50,— gld. estas enskribitaj en la "Ora Libro pri la Domo". Malavare donacu por la propra sidejo de la asocio !

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo.

M. H. Vermaas,
Direktorino C.O.

# ANONCETOJ

*AVERTO - Nek la redakcio, nek UEA iel ajn respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, aŭ pri plenumado de promesoj faritaj en ili. Tio aparte koncernas poŝtmarkkolektantojn.*

**Propagandan Esperanto-ekspozicion** kaj letervesperon aranĝos en marto unua pola ĝeneral-kleriga liceo, en kiu kvar plenaj klasoj lernas Esperanton kiel devigan objekton. Helpu en poresperanta propaganda laboro, sendante gratulojn kaj diversajn esperantaĵojn. 120 gelernantoj 15—18 jaraj kaj kvin geprofesoroj deziras korespondi tutmonde. Adresu ĉion al: mgr Maria J. Krausowa, SOSNOWIEC, Skr. poczt. 48, Pollando.

**Se vi serĉas** seriozajn gekorespondantojn ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejoj) turnu vin al la Koresponda Servo de UEA (adreso: K.S.M. 12, rue des Jacobins, Clermont-Fed (PdD) Francujo) kiu peras adresojn laŭ la regularo aperinta en Jarlibro 1962-a.

**Deziras interŝanĝi poŝtmarkojn** kun tutmondo nova esperantistino, S-ino Inge Iversen, Ministerio de Justico, Slotsholmgade 10, Kopenhago K., Danlando.

**Martinus Instituto** subtenas liberecon en esplorado kaj kreado de objektiva vivkoncepto. Petu senpagan ilustritan faldprospekton ĉe la instituto, Mariendalsvej 94-96, Kopenhago F., Danlando.

**Deziras interŝanĝi poŝtmarkojn** kun ĉiuj landoj: Alfred Mayer, Zeppelinstr. 35, (75) Karlsruhe, Germanujo.

**Grupo da viroj,** 25-35 jaraĝaj, deziras kontakti ĉiujn landojn aŭ per letero aŭ per magnetofono. Specialaj interesoj: Hispanujo, Usono, ktp. S-ro Vincent Ponz, 3561 Hutchison, Montreal, P.Q., Kanado.

**Persona infinitivo** — lingvistoj certigas, ke nur la idiomoj portugala kaj "gallega", parolata en Galico, Hispanujo — posedas **personan infinitivon.** Mi deziras korespondi pri ĉi tiu demando kun scipovanto de "gallego". Paulino Santiago, Del. de UEA, rua Barão de Penedo, 52, Maceió, Alagoas, Brazilo.

**28-jara scivolema junulo deziras** korespondi kun tuta mondo por fondi klubon de korespondado. Respondo garantiata. Alvacy Plauda da Silva, -IAPI- Lagoa Vermelha, Rio Grande do Sul, Brazilo.

**Motiv-poŝtmarkojn** interŝanĝas, H. Khel, Pivonková 2124, Praha 10, Ĉeĥoslovakio.

La esperantista sekcio de la Lauka Amikaro aranĝos ekspozicion kaj letervesperon. Limdato: 1-an de majo 1963. Afable sendu salutkartojn kaj esperantaĵojn al la kursgvidanto. Afranku filatele ! Korespondopetoj plenumotaj de Lucien Bourgois, 21 rue Gambetta, Noyelles-Godault, P. de C., Francujo.

**Arne Bengtsson,** Åbybergsgatan 32, Mölndal, Svedujo, 44-jara laboristo deziras korespondi pri literaturo, arto, filozofio, psikologio, religio, la naturo en ĉiuj landoj.

**23-jara instruisto** deziras korespondi pri literaturo, geografio, folkloro, fotografio kaj muziko. Kolektas bildkartojn kun ĉiuj landoj. Tadeusz Golonka, Nowa Huta, ul. Kocmyrzowska 28, XI Liceum Ogóln, Os. C-1, Pollando.

**D-ro Frigyes Kürschner** el Budapeŝto sciigas siaj korespondantoj, ke pro grava malsano li devas interrompi ĉiun korespondadon.

**Literatura mondo.** Vendata. Kompletaj unua kaj tria periodoj. Krom ili multaj opaj numeroj el ĉiuj tri periodoj. Skribu al: Ladislao Somlai, Budapest V., Bajcsy Zsilinsky ut 40, Hungarujo.

**Avri Salamon,** Qiryat-Motzkik, P.O.B. 8 (Israelo) deziras tutmondan pm-interŝanĝadon. Afranku filatele !

**32-jara laboristo,** deziras korespondi kun samideanoj pri ĉiuj temoj en la tuta mondo. S-ro Gert Andersson, Fjällgatan 54A, Borås, Svedujo.

**Nur interstene** korespondas Itaru Ooba Dairi-Ni si Sinmati (Yokuokaken) Mozi-51 (Japanujo) (Esperante, japane).

**Instruisto** deziras korespondi. Dufourg, Arbavats-Gironde, Francujo.

**Deziras korespondi** poŝtkarte, aerpoŝte, filatele: kun ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj: Esperanto, Teknika Liceo, B.P. 225, Bamako, Republiko Mali, Afriko.

**Letervespero** 27.3.1963 aranĝota okaze de kursfino (20-70 jaraj). Respondo garantiata. Sendu amase salutkartojn kaj leterojn. Herning Esperanto Klubo, H. P. Jespersen, Bryygergade 3, Herning, Danlando.

**Filmklubo** deziras korespondi kun tuta mondo pri ĉio bela. Nepre respondas. Lesława Winnicka, str. Walowa 38/47, Gdańsk, Pollando.

**Esperanto-Civito.** Grava artikolo en "British Esperantist", julio-aŭgusto 1962. Ekzemplerojn po 1 ŝilingo aŭ 2 rpk. de D. Soleo, 14B Castle Avenue, Dover, Britujo.

**Profesoro Aderaldo Rocha** deziras korespondadon pri lingvoj, letargio kaj parapsikologio. Rua Belo Horizonte 133, Itabuna, Bahia, Brazilo.

**Mi deziras interkorespondi** kun tutmondaj malsanflegistoj aŭ Kuracisthelpantoj por pritrakti la laborkondiĉojn. S-ro Santiago Saz Andrés, Plaza Ballesteros 2-2° Calatayud (Zaragoza) Hispanujo.

**Azary Perelman** deziras korespondi kun samideanoj el ĉiuj landoj de Azio kaj Afriko — Adreso: U.S.S.R. Krimeo, Simféropol, Poŝtkesto 45.

## *Lastmomente*

**48-a Universala Kongreso**

# INTERNACIA EKZAMENO

*La Internacia Ekzamena Komisiono denove ekzamenos en Sofio. Skriba parto de la ekzameno: posttagmeze, la 1-an de aŭgusto; parola parto, la 2-an de aŭgusto. Al la ekzameno povas esti allasita nur persono, kiu sukcese finis per diplomo minimume mezgradan lernejon kaj kiu plene posedas la Internacian Lingvon. Ĉiu persono, kiu deziras kandidatiĝi, bonvolu sendi, kiel eble plej frue (limdato la 1-a de majo), al la sekretariino de I.E.K.: esperantlingvan tradukon de la diplomo pruvanta, ke la kandidato finis mezlernejon (la ĝusteco de la traduko devas esti konfirmita de kompetenta instanco) kaj ateston pri sukcese plenumita supera ekzameno de Esperanto en sia lando, aŭ alian pruvon pri plena posedo de la lingvo. La kotizo por la ekzameno estas du usonaj dolaroj aŭ ekvivalento, kaj devas esti pagita samtempe. La sekretariino konsentas ĉi-jare akcepti "stelojn" de UL (30) aŭ int. respondkuponojn (25) sed tio ne estas liganta precedenco. Kandidato, kiu pro registaraj reguloj absolute ne povas antaŭpagi la kotizon, sed kiu vere atendas ĉeesti la Kongreson, konsultu la sekretariinon, kiu konsideros la eblecon de speciala aranĝo.*

*Akceptitaj kandidatoj ricevos specimenajn demandarojn kaj pli detalajn informojn.*

*Laŭ la Regularo de IEK, sukceso en la ekzameno devas "atesti, surbaze de rigora ekzameno, la kapablon instrui Esperanton je supera nivelo". Kandidatoj do atendu ekzamenon, kies kriterioj similas tiujn por universitata diplomo. Sekretariino: F-ino Marjorie Boulton, 1 Inglefield Avenue, High Lane, Burslem, Stoke-on-Trent, Staffs., Anglujo. Informpetantoj bonvolu sendi int. respondkuponon.*

---

**RABATO POR BULGARA VIZO. La Bulgara Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj ĵus informis ke ĉiuj bulgaraj diplomatiaj reprezentantoj en eksterlando estas instrukciitaj postuli nur 50 % de la kutima kotizo por la enirvizo. Kongresano, por ĝui la supre menciitan rabaton, devas prezenti sian kongresan karton.**

# TIU ĈI NUMERO ESTAS LA LASTA

**KIUN VI RICEVAS ĜIS VI ESTOS PAGINTA VIAN KOTIZON 1963.**

**ZORGU, KE NENIU NUMERO MANKOS AL VI: DO, SE VI FORGESIS ĜIS NUN,**

# P A G U  T U J !




# La Internacia Afiŝo

Kvarkolora
Moderna
Kun taŭga
blanka spaco
por naci-
lingva
teksto

Prezoj :

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| Formato | po 1 ekz. | 0.20 gld. | ( 0.80 steloj) |
| 41,5 × 59 cm: | po 100 ekz. | 18.— gld. | ( 72.— steloj) |
| | po 1000 ekz. | 165.— gld. | ( 660.— stelcj) |
| Formato | po 1 ekz. | 0.40 gld. | ( 1.60 steloj) |
| 58,8 × 83,2 cm: | po 100 ekz. | 36.— gld. | ( 144.— steloj) |
| | po 1000 ekz. | 330.— gld. | (1320.— steloj) |

Tuj mendu ĝin ĉe la Centra Oficejo

MONDA KULTURO

INTERNACIA REVUO
PRI LITERATURO
FILMO TEATRO

Aperas kvaronjare.
Abonprezo: 15.- gld., 60 steloj aŭ egalvaloro. Mendu ĝin pere de la konataj perantoj aŭ rekte de U.E.A., Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam, Nederlando. Poŝtĉekkonto: 378964.

**LA REVUO KIUN NI BEZONAS !**

# HELSINGÖR INVITAS VIN

21.—28.7.1963 okazos la feriaj Esperanto-kursoj: 1) konversacia, 2) perfektiga, 3) elementa laŭ naturmetodo, 4) prepara kurso por naturmetodaj geinstruistoj, 5) prelegoj literaturaj. Aliĝo antaŭ 20/6. Detala programo havebla ĉe

s-ro L. Friis,
Ingemannsvej 9,
**Aabyhøj,** Danlando.

## 11-a Internacia Esperantista Ferio-Semajno

11-19an aŭgusto 1963 en Krommenie, Nederlando. La Esperanto-grupo "Unueco" en Krommenie kore invitas la esperantistajn unuopulojn kaj grupetojn partopreni en la 11-a Internacia Esperantista Ferio-semajno, kiu en ĉi tiu jaro okazos dum la tagoj 11—19a de aŭgusto. En la programo ni prezentas Interkonatigan vesperon, allogajn ekskursojn aŭtobuse kaj ŝipe al la plej vidindaj lokoj de Nederlando. Ĉiuj partoprenantoj gastos senpage en la hejmoj de lokaj gesamideanoj, TIAL la partoprenkostoj estas nur 60 gld. (240 steloj) por la tuta semajno. Ĉi tiu sumo entenas ankaŭ la kostojn de ĉiuj ekskursoj. La limdato de la aliĝo estas la 1-a de majo, 1963. Detalajn informojn volonte donas nia sekretariino J. A. v. d. Meulen-v. Harten, Popelstraat N. 13, Krommenie.

# „LA ĜUSTA VOJO"

estas internacia interesa revueto por katolikaj esperantistoj. En majo 1960 ĝi ricevis la benon de Papo Johano XXIII. La enhavo konsistas el evangelio laŭ kat. teksto tradukita, el sciigoj de kristana vivo, el la tutmonda Esperanto-movado, el instrua kaj rakonta parto kaj kelkfoje ankaŭ el spritaĵoj. Iamaj numeroj estas haveblaj: 12 n-roj por 10 steloj. La kuranta jarabono kostas 4.- DM aŭ 10 stelojn. Ĝi aperas dumonate. Mendebla ĉe Maria Schöttl, 8 München 19, Schulstr. 26/I. Germanujo, aŭ ĉe U.E.A.

# ARTISTOJ ESPERANTISTOJ !

Frisa Esperantista Rondo en Leeuwarden, Nederlando, petas **projektojn pri ornamaĵo,** alta je 3—3,5 m, kiu, starante en la Zamenhof-parko sur iom vasta herba tapiŝo, klare esprimas la **ideon de Esperanto.**

Detalaj informoj:
Koekoekstr. 8, Leeuwarden

Presita en Nederlando ĉe Zwagers, Rotterdam